

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Kiaj estas la katalunaj
esperantistoj?

Forumoj en Ĝenevo kaj
en Krynica

Aktivado inter verduloj
kaj vegetaranoj

364 mil diskoj en
Esperanto

Novaj lingvoj en EU

Ĉinaj esperantistoj por
la Pekinaj Olimpikoj

Tri novaj libroj aperis
en Kaliningrado

Poemoj de Batjuŝkov

Nia Trezoro: *Esperanta
Antologio*



Oktobro
2008

№10

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2008. №10 (168)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №10 (168).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 15 сентября 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Sufiĉa nombro de sufiĉe evidentaj paraleloj: montaro simila al Balkanoj, angulo simila al Kosovo, “Amour sacré de la Patrie...” kun du egale ardaĵ analogoj en la rusa kaj en la kartvela kaj — jen kongruo preskaŭ mistika — portreta kopio de la kartvela prezidento, la rusia reprezentanto ĉe NATO Dm. Rogozin, flama patrioto kaj tute nefleksebla diplomato. Iom tro da fajro ĉirkaŭ komplekso piroteĥnika, nomata Kaŭkazo.



Formale la situo ŝajnas klara. Sud-Osetio estas parto de Kartvelujo kun konsiderinda kvanto da kartveloj loĝantaj ene. Antaŭnelonge Ruslando ne ceremoniis por reobeigi Ĉeĉenion, teritorion multe pli homogenan en sia nacia konsisto kaj sia volo al sendependeco; ĝi faris tion en la jura kunteksto de la konservo de sia integreco.

Reale oni ne havas plu la saman kuntekston, la separo de Kosovo kreis precedencon. Kaj, se oni rajtas paroli pri internacia juro, ĝi estas certe **jur**o precedenca. Aliaj precedencoj ne malpli gravedas. Certaj ŝtatoj (ĉiu povas mem ilin nomi) emis bombardi certajn “punktojn” sur fremda teritorio por “devigi al paco” iun oponanton. La samaj ŝtatoj planis kaj plenumis sekretajn operaciojn de puno kontraŭ personoj neplaĉaj, nun oni informas, ke unu tia ŝtato opinias normala, eĉ jura, uzi torturon kontraŭ teroristo...

La bazaj landoj de la kolapsinta totalismo de la komenco de sia nova vivo solene anoncis pri la deziro lerni de siaj demokratiaj najbaroj, — tiuj anoncoj ne restis malplena sono. Kaj jen ekzemplo de fiknabo en lernejo: de siaj pli aĝaj kamaradoj li lernis fumi kaj blasfemi kaj turmenti la pli malfortan. Certe, li dekomence ne estis anĝelo, sed ili donis decidan apogon al liaj fi-inklinoj.

Ni ne troigu en tiuj formuloj: ŝtato, lando, Rusujo, Kartvelujo. Ĉio ĉi estas abstraktaĵoj, kun diversaj areoj de la kovro. Estas ŝtato de ŝtatestroj kaj tiu de ŝtatistoj, estas lando kiel statistika sumo loĝantara, aŭ kiel kultura post-resto en la civilizo. Ĉiu konkreta homo havas sian lokon en tiuj kompleksoj, sian pecon de partopreno, sian respondecon, sian meriton kaj sian guton de kulpo. En la nunmonda kohereco perdas absolutan signifon la nocioj “ekster” kaj “en”, kaj la komuna respondeco igas fakte ĉiun el ni ano de la homaro.

Ĉi rezonoj ne malhelpas, ne maldevigas indiki pli senperajn kulpantojn de la sud-osetia dramo. Ili estas la aŭtoroj de la precedencoj kaj la ŝtataj viroj kiuj rapidis ilin sekvi, ankaŭ la agentoj, kiuj planis kaj realigis la anticipajn provokojn, ankaŭ la soldatoj, kiuj bombardis de ambaŭ flankoj la civilan Ĉinvalon...

Malgraŭ la amaso de eblaj kriterioj ne restas tro da variantoj por resumi. Rusujo en sia teritoria dimensio konfirmis siajn faktajn gajnojn de la svaga epoko. Rusujo en ĉiuj dimensioj de tiu abstraktaĵo — ŝtatista kaj popola, kultura kaj (eĉ antaŭ ĉio) geopolitika — klare malgajnis la aferon.

Alen Kris

Kovrilpaĝo: Agnieszka Mozer, kiu deĵoris en la Esperanto-stando en Krynica, estis unu el la aĉetintoj de *Gazeta Wyborcza* kun la Esperanto-disko. (*Fotis Tobiasz Kaźmierski*)

La katalunaj esperantistoj, gloka kolektivo

de Hektor Alos i Font

Ĉirkaŭ dek jarojn post la eldono de la unua gramatiko de Esperanto estas novaĵoj pri la unuaj katalunoj, kiuj interesiĝis pri ĝi. Ĉi tiuj pioniroj, laŭ la analizoj de la historiistoj, estis pastroj, militistoj kaj liberalaj profesiuloj. Tio povas surprizi, sed klariĝas, se ni pensas, kiu tiutempe sciis legi kaj skribi kaj krome disponis pri sufiĉe da tempo por okupiĝi pri nepagata aktivaĵo. La socio multe ŝanĝiĝis kaj tial tia priskribo ne kongruas kun la prototipo de hodiaŭa esperantisto, kiun ni vole-nevole havas en kape.

Kvankam en aliaj landoj estis faritaj sociologiaj esploroj pri la lokaj esperantistoj, tiaj ankoraŭ mankis en Katalunio, krom kelkaj studentaj monografioj. Sekve, la celo de nia studo estis trovi la socian, kulturalan kaj ideologian profilon de la katalunaj esperantistoj.

Nia komenca impresio estis, ke temis plimulte pri viroj, el meza aŭ suba-meza klaso, kun alta klereco, poliglota, kun kulturaj intereso, politike proksimaj al sendependismo kaj, malpli, al anarkismo. La studo celis konfirmi tiun impreson, komparante diversajn trajtojn de la esperantistoj kun la tuta loĝantaro.

Samtempe oni esploris, ĉu estas sociaj aŭ ideologiaj paradigmoj korelaciitaj kun pli altaj kono de la lingvo kaj aktiveco en la movado. Tiucele oni kontrastis la totalajn valorojn de la respondoj kun kvin variabloj: aĝo, sekso, jaro de lernado de la lingvo, grado de kono de la lingvo kaj nivelo de aktiveco en la Esperanto-movado.

Aldone, la esploro inkluzivis ankaŭ la komparon de niaj rezultoj kun tiuj de aliaj esploroj prezentitaj en la libro *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio* de Nikola Rašić (1994).

Kolektado de la donitaĵoj

En novembro 2007 estis lanĉita enketo. Oni uzis formularon kun 90 demandoj. La demandaron oni dissendis per interreto kaj per konvencia poŝto al retlistoj kaj al centoj da unuopaj adresoj,

	0-9	10-19	20-29	30-39	40-49	50-59	60-69	70-79	80+
Katalunio	10%	9%	15%	18%	15%	12%	9%	8%	4%
Esperantistoj	0%	9%	16%	10%	29%	14%	9%	6%	6%

Distribuo de la kataluna loĝantaro kaj de la esperantistoj laŭ aĝo

atentante iamajn korespondajn lernantojn, memlernantojn en www.lernu.net kaj anojn de la socia reto www.amikumu.net sen konata ligo kun la loka Esperanto-movado. Oni petis al aktivuloj kaj lokaj grupoj, ke ili diskonigu la enketon, ĉefe inter la nunaj lernantoj. Per ordinara poŝto la enketilo estis sendita al ĉefe veteranaj esperantistoj sen interreta ligo. Plie, laŭlonge de la kvin-semajna kolektado de la respondoj ĉi tiuj estis kontrolataj por provi pliekvilibrigi la respondojn laŭ kriterioj de sekso, aĝo kaj membreco, insistante ĉe difinitaj grupoj.

Difino de la celgrupo

Pluraj demandoj de la enketo celis enprofundiĝi en la difinon de la vorto "esperantisto". Temas ja pri malklara termino, tamen abundege uzata, kie

konkurencas la ideo, ke apartenas al tiu grupo la Esperanto-parolantoj, senrilate al ilia subteno al iu ideo, kaj la sinteno, ke membras en ĝi tiaj homoj subtenantaj idearon, sendepende de ĉu ili iam lernis la lingvon. La esprimitaj eksplicitaj opinioj estis ankaŭ konfrontitaj al aliaj respondoj de la enketitoj, tiel ke evidentiĝis, ke, en larĝega proporcio, ambaŭ faktoroj estas necesaj, por ke homoj agnosku sin kiel esperantistoj kaj por ke aliaj ilin agnosku kiel tiaj. Sekve, estis elektitaj nur la enketitoj loĝantaj en Katalunio, deklarintaj sin esperantistoj kaj iam lernintaj la lingvon. Tial, el 159 respondoj, oni elektis 98 de homoj plenumantaj tiujn kriteriojn, kio estas la sampla, sur kiu baziĝas ĉi tiu esploro.

Tiu sampla estis kontrolita surbaze de konataj donitaĵoj pri la distribuo de la

☞ pĝ 4

	Ne finintaj la elementan lernejon	Elementa lernejo	Meza lernejo	Supera lernejo
Katalunio	11%	37%	35%	18%
Esperantistoj	1%	13%	37%	49%

Distribuo de la kataluna loĝantaro kaj de la esperantistoj laŭ klereco



La dekstra foto estis farita 11 sep 2008, en la asocia foiro, okaze de la nacia tago de Katalunio. (Fotis Gerard Sugranyes)

membroj de Esperanto-asocioj en Katalunio laŭ sekso kaj aĝo kaj pri la kvanto de membroj de tiuj asocioj. Krome oni celis eviti la superreprezentigon de movadanoj, kiuj pli emas respondi enketojn ol normalaj membroj. El tiu rezultis la starigo de pesitaj mezumoj, kiuj helpis plifidindigi la rezultojn.

Konkludoj

La studo konfirmis la komencajn bazajn hipotezojn, kaj enprofundiĝis en ilin per ilia kvantigo kaj liverante elementojn por klarigi certajn fenomenojn. La katalunaj esperantistoj estas tre markite viraj, sufiĉe regule distribuitaj laŭ aĝoj krom sub 20 jaroj, loĝantaj ĉefe en grandaj urboj, universitataj studentoj aŭ homoj finintaj superan klerecon, ofte instruistoj aŭ komputistoj, ekonomie mezklasaj salajruloj, katalunlingvanoj, poliglotoj, ne malofte kun aliland-devena vivoparulo, ateistoj aŭ agnostikuloj, kutimaj legantoj de libroj kaj gazetoj, aktivaj en la politika kaj asocia vivo de la lando — ĉefe en rilato al homaj rajtoj, helpo al disvolviĝo kaj ekologio — kaj kun forta simpatio al sendependismo, ekologia maldekstro aŭ anarkiismo. Ili ekkonis Esperanton per familianoj aŭ amikoj — kvankam lastatempe ofte per interreto — sed lernis ĝin pro persona idealisma konvinko, ĉefe inter la 15a kaj 30a jar-aĝo. La plimulto iam aktivis en la Esperanto-movado kaj per tio atingas oftan uzadon de la lingvo, ĉefe legan kaj skriban, kaj bonan nivelon. Tamen, kutime ili legas malmultajn librojn en Esperanto kaj, krom la bultenon de la

asocio, en kiu ili membras, ne abonas pli ol unu Esperanto-revuon.

Germà Martín, en siaj studoj de la jaroj 2002 kaj 2003 pri la Esperanto-grupo de L’Hospitalet de Llobregat kaj la Esperanto-fako de la asocio Amikoj de Unesko de Barcelono klopodis konfirmi la hipotezon, ke “la lernado de Esperanto logas homojn kun preferoj por alternativaj viv-elektoj”, se oni komprenas ĉi tiujn kiel “vivstilon favorantan aron de intereso postmateriismaj (t.e. ne-materiaj, ekster la konsumsocio) kaj de vivkompreno el perspektivo de respekto, tolero kaj egaleco de la naciecoj, lingvoj, homoj kaj naturo”. Lian hipotezon ni plene subtenas.

Aliflanke, neantaŭvidita rezulto de ĉi studo estas, ke la persona engaĝiĝo en la Esperanto-movado estas la ĉefa elemento, kiu, en multaj okazoj, permesas atingi fluan parolkapablon — iagrade agante simile al la eksterlandaj staĝoj en la lernado de fremdaj lingvoj. Tamen aktivismo montriĝas tre ligita al familiaj cirkonstancoj, ĉefe al la manko de gefiloj aŭ al ilia emancipiteco. Tiu punkto ŝajnas esenca por klarigi la malaltan nivelon de ina partopreno en la kataluna Esperanto-movado — kio estas sentebla en la asociaj movadoj, sed kiu estas multe pli streĉa inter la esperantistoj, kie oni postulas unue la lernadon de lingvo kaj poste la konservadon de ĝia uzkapablo. Estas malkuraĝige trovi tian respugulon de masklisma socio je tioma grado, eĉ inter progresemluloj kun alta studnivelo, la socia grupo de la esperantistoj.

Alia aspekto montrita de la studo estas la granda nombro de internaciaj paroj — fenomeno kreskanta en la socio, sed delonge establita inter la esperantistoj. Tio igis, ke la nombro de lingvoj parolataj en la hejmoj de esperantistoj estas pli alta ol tiu de la antaŭa generacio, kvankam samtempe estas rimarkinda intergeneracia tendenco al pli granda hejma uzo de la kataluna, ĝenerala en la socio.

Aliflanke, estas interese demandi sin, kiel ŝanĝiĝas la esperantistoj, se ili ŝanĝiĝas, pro sia esperantisteco: kiel ilia pli granda interagado kun alilandanoj evoluigas iliajn sintenojn. Ni starigis la hipotezon, ke la esperantistoj montriĝas pli imunaj al stereotipoj pri ŝtatoj, lingvoj aŭ religioj ol la plimulto de siaj kuncivitanoj. La hipotezo ne povis esti akceptita aŭ mal-, sed la datumoj ŝajnas indiki, ke Esperanto ne senteble modifas la antaŭjuĝojn, kiujn eventuale havis antaŭe la esperantistoj, kio verŝajne estas surpriziga. Pli specifaj studoj estas farindaj por konfirmi aŭ nuanci tiun konstaton.

Entute, ni povas konsideri la katalunan esperantistaron kolektivo rimarkinde gloka: samtempe globa kaj loka. Ĝi montriĝas ebla malfermiĝo al globa mondo, de kiu la Esperanto-komunumo estas mikrokosmo, konservante fortan ligitcon kun la lando kaj la aŭtoktona lingvo.

Mult-tabelan 268-paĝan raporton pri la esploro eblas legi en la kataluna ĉe www.esperanto.cat/material/esp_cat_200711.pdf

Kategorio	Totalo	Ĉiutage	Kelkfoje semajne	Kelkfoje monate	Kelkfoje jare	Malpli ofte	Neniam	Ne respondis	
Totalo	100%	20%	29%	18%	13%	8%	8%	3%	
Pesita mezumo	100%	12%	31%	20%	16%	9%	9%	3%	
Aĝo	10-29 jaroj	26%	28%	24%	16%	12%	0%	16%	4%
	30-59 jaroj	53%	21%	23%	17%	15%	13%	8%	2%
	60+ jaroj	21%	10%	48%	24%	10%	5%	0%	5%
Sekso	Inoj	24%	21%	17%	25%	17%	13%	4%	4%
	Viroj	76%	20%	32%	16%	12%	7%	9%	3%
Aktiveco	Aktivuloj	19%	68%	26%	5%	0%	0%	0%	0%
	Uzantoj	81%	9%	29%	22%	16%	10%	10%	4%
Jaro de la eklerno	2003-2007	37%	19%	25%	11%	17%	6%	14%	8%
	1988-2002	23%	17%	30%	17%	22%	9%	4%	0%
	Antaŭ 1988	39%	24%	32%	26%	3%	11%	5%	0%
Kono de Esperanto	Tre malalta	26%	0%	4%	12%	24%	16%	32%	12%
	Malalta	20%	5%	35%	20%	30%	10%	0%	0%
	Meza	32%	19%	42%	32%	3%	3%	0%	0%
	Alta	22%	59%	32%	5%	0%	5%	0%	0%

Ekzemplo de pritraktado de demando: Ofteco de legado (procenta prezento)

UEA en la Socia Forumo de UN

UEA ĉeestis en la tritaga (1–3 sep) Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, kiu traktis la malriĉecon en la mondo. Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis tute mtempe Charmian Common kaj Stefano Keller, kaj en la unua tago Cesco Reale.

Post trastudo de la diskuttemoj kaj la sperto dum la unua tago, la delegitoj de UEA decidis interveni en la konkluda periodo. Krom la necesaj informoj pri la proceduro, ili ricevis tre utilajn konsilojn kaj sugestojn de Francoise Mandallaz, kunlaborantino de la ĉefo de la UN-oficejo por ligoj kun NRO-j, Ricardo Espinosa, kiu prelegis en la aprila Datrevena Simpozio de UEA pri lingvaj homaj rajtoj.

Laŭ Stefano Keller, pro strategiaj kialoj la reprezentantoj de UEA modifis sian planon kaj anoncis sian unuan alparolon jam por la dua tago kadre de la diskuto post la parolado de Anna Biondi el la Internacia Sindikata Konfederacio. Ankaŭ ŝi prelegis en la aprila Simpozio en sia rolo de vicprezidanto de la Ĝeneva NRO-komunumo.

Keller prezentis proponon de UEA pri kunlaboro por tradukado kaj disvastigo de la konkluda dokumento de la Forumo en Esperanto kaj kelkaj lingvoj aliaj ol la ses oficialaj lingvoj de UN. Post lia interveno Anna Biondi anoncis, ke ŝi jam havas kun si informilojn por doni al “miaj esperantistaj amikoj” por la tradukado. La duan fojon UEA intervenis en la konkluda parto, kiam Keller komencis sian paroladon per danko al la interpretistoj pro ilia signifa kaj granda laboro kaj finis memorigante pri la esperantista propono al la Forumo. Ambaŭfoje la prezidanto de la Forumo, Mousa Burayzat, konstanta reprezentanto de Jordanio ĉe UN en Ĝenevo, reagis tre pozitive. Dum paŭzo li kontente malkovris, tra la retejo de la UEA-komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko, ke la unua Mezorienta Kunveno esperantista meze de aprilo okazis ĝuste en lia lando.

Ankaŭ aliaj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto post aŭdo pri ĝi kaj prenis informilojn ekspoziciitajn.

La Forumo estis bona okazo por ligi novajn kontaktojn kaj plifortigi tiujn kun prelegintoj de la Datrevena Simpozio, el kiuj ĉeestis, krom Anna Biondi, ankaŭ ŝia antaŭulo kiel prezidanto de la NRO-komunumo, Renate Bloem, kaj ambasadoro Ronald Barnes el Alasko.

GK UEA



Krynica ebligas utilajn kontaktojn: Dušan Ĉaplovič kaj Peter Baláž (*Fotis Agnieszka Mozer*)

En Krynica denove kun Esperanto

10–13 sep okazis en sudpola banurbeto Krynica la 18a Ekonomia Forumo. Jam la trian fojon ĉeestis ĝin Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kiel oficiala partnero de la aranĝo, kun propra panel-diskuto. Same la trian fojon estis reprezentata ankaŭ Esperanto en informstando kun abundaj informiloj en la tri oficialaj lingvoj de la forumo, pola, angla kaj rusa.

Ĉi-jara temo de la EEU-panelo estis: “Unuiĝintaj en diverseco? Lingvolernado kaj eŭropa identeco”. La diskuton gvidis Barbara Pietrzak, kiu nome de UEA prezentis ankaŭ gravajn informojn rilatajn al Esperanto kaj ĝia propedeŭtika valoro. Aliaj panelistoj estis Zlatko Tišljari, Georgo Handzlik kaj Peter Baláž.

Informado pri Esperanto dum la forumo estis riĉa kaj sukcesa — kelkaj atentokaptaj informiloj allogis multajn homojn. Informiloj estis disdonataj ankaŭ ekster la forumaj konstruaĵoj, al preterpasantoj.

Plua sukceso de la forumo estis la eblo kapti plurajn gravajn personojn en kampoj de politiko, ekonomiko kaj kulturo. Ekzemple, ni renkontiĝis kaj interparolis kun eksprezidanto de Pollando Lech Wałęsa kaj nuna vicĉefministro de Slovakio Dušan Ĉaplovič.

La aranĝon kunfinancis ĉi-jare EEU, UEA kaj ESF. Grandan dankon pro ebligado de la partopreno meritas la prezidanto de PEA Halina Komar, danke al kies kontaktoj reprezentiga Esperanto en la forumo. Same necesas danki al membroj de PEJ (Pola Esperanto-Junularo), jam regulaj deĵorantoj en la Esperanto-budo.

Peter Baláž

Esperanto: amiko aŭ malamiko?

14 jul 2008 okazis en la Eŭropa Parlamento (EP) en Bruselo diskuto pri la temo: “Esperanto: ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo”. La inviton al la forumo sendis nome de dekkvino da EP-anoj unu el la vicprezidantoj, Bronisław Geremek kaj kunsuskribis EP-anino Ljudmila Novak. Partoprenis 25 personoj inter kiuj ses parlamentanoj de EP.

Pro la bedaŭrinda morto de Geremek, unu tagon antaŭe en aŭtoakcidento, enkonduke parolis Seán Ó Riain kaj Ljudmila Novak. Partoprenis la debaton ankaŭ Margareta Handzlik kaj germana parlamentano. En la sama ejo estis prezentita ankaŭ ekspozicio pri Esperanto.

Maja Tišljari

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)

Finiĝis la respondkuponona erao

Dum multaj jardekoj UEA akceptis pagojn per internaciaj respondkuponoj. Ili estis simpla pagmaniero, kiam internaciaj monĝiroj per banko aŭ poŝtmandato estis malfacile fareblaj kaj subigitaj al diversaj limigoj aŭ eĉ ne permesitaj al privatuloj.

Lastatempe ilia uzado maloftiĝis, ĉar internaciaj pagoj fariĝis pli facilaj dank’ al la forigo aŭ mildigo de limigoj kaj pro disvastiĝo de kreditkartoj kaj de retaj pagmanieroj, ekzemple, *PayPal*. En 1997 UEA ankoraŭ ricevis 1652 respondkuponojn sed en 2007 nur 43, t.e. 2,6% de la nombro dek jarojn pli frue.

Antaŭe la Centra Oficejo povis facile ŝanĝi la kuponojn en poŝtmarkojn en sia kutima poŝtejo. Nuntempe la poŝtejo ne plu akceptas ilin, kaj ĉi-jare nur per escepta aranĝo la poŝta entrepreno TNT konsentis akcepti de UEA, por la lasta fojo, kvanton da kuponoj. Ankaŭ en multaj aliaj landoj internaciaj respondkuponoj ne plu estas vendataj nek akceptataj de la poŝto. Antaŭe ili ankaŭ havis senliman validecon, sed jam de kelkaj jaroj ili validas nur ĝis la dato presita sur ili. Parto de la kuponoj, kiujn UEA lastatempe ricevis de siaj membroj kaj klientoj, estis jam senvaloraj. Evidente ili cirkulis inter pluraj homoj, kaj neniu rimarkis, ke ilia valideco estis tempe limigita.

Pro la priskribita evoluo UEA ne plu akceptas internaciajn respondkuponojn kiel pagilojn por kotizoj aŭ servoj nek por aldoni bonhaston al UEA-kontoj.

GK UEA

Pollando: reveno al bona tradicio

30-foje okazis la landaj Esperanto-kongresoj en Pollando. La 31an spertis en Lodzo (20–24 aŭg 2008) 115 kongresanoj inkluzive de kelkaj gastoj el Germanio, Hungario, Svedio kaj Anglio.

La unua kongreso estis organizita en Varsovio en 1922. Antaŭ la Dua Mondmilito okazis ok kongresoj: tri en Krakovo, du en Varsovio, po unu en Lodzo, Poznano, Lublino.

Tuj post la milito en 1946 ni kongresis en Lodzo, poste en Varsovio (1947, 1948, 1956), kaj poste, dum pli ol 50 jaroj, la pollandaj kongresoj okazis ekster Varsovio.

La movadkernan rolon post Varsovio provis preni Krakovo kaj Lodzo, dufoje ankaŭ Ŝĉecino. Postaj jaroj montras al ni falon de la movado, kiam esperantistoj perdis emon preni seriozajn taskojn.

Rigardante la kongresan kalendaron, oni povas konstati, ke la plej aktivaj estis ĝuste esperantistoj en Lodzo, kiuj ses-foje okazigis la landajn kongresojn, laste en 1998, kiam Lodzo gastigis la 29an kongreson. Ĉi-jare, post ok-jara paŭzo (la 30a kongreso okazis en Krakovo en 2000) Lodzo rekomencis la tradicion de ĉiujaraj landaj kongresoj en Pollando (krom 2009, kiam estos Bjalistoka UK). La nomo Tutpollanda Esperanto-Kongreso (TEK) signifas, ke ĝi estis organizita por la tuta pollanda esperantistaro. Kvankam ĝin preparis PEA-Filio en Lodzo, al ĝi kontribuis pluraj pollandaj esperantistaj organizoj.

La kongresa temo estis *Lingvo — ilo kaj rimedo de dialogo*, kaj ni komencis ĝin sub aŭspicio de Nacia Centro de Kulturo, kiu citas profesoron pastron Józef Tiszner: “Dialogo estas konstruado de reciprokeco”. La Honora protektanto de la kongreso estis prof. Jerzy Kropiwnicki, la urbestro de Lodzo.

La programo estis riĉa, interesa, kaj ankaŭ ambicia, ĉar oni diskutis pri tre gravaj movadaj problemoj ĝis nun ne solvitaj: unuiĝo organiza, komuna instruprograme, dialogo inter ni ĉiuj, ja samideanoj! La kongreso iĝis komenco de dialogo inter diversaj, malsamaj societoj, kluboj kaj rondoj, kun malsamaj opinioj kaj spertoj, sed kun emserĉi la reciprokecan interkomprenon.

Kadre de TEK kunsidis delegitoj de PEA kaj LKK de la 94a UK en Bjalistoko. La festan vesperon kun arta programo preparis ILEI-Pollando okaze de distingo per la honora membreco de Maria Majerczak, fondintino kaj gvidantino de ILEI en nia lando.

La organiza teamo sub la gvido de la prezidanto de PEA-Filio, Robert Kamiński, kun la helpo de Zosia Smistek, Ela Kębłowska, Maria Srogosz kaj aliaj, bonege preparis la tuton. Ili eldonis belan kongreslibron, zorgis pri bonaj kondiĉoj kaj pri distra programo: rememoroj pri la centjariĝo de la Lodza Esperanto-movado, urbovizitado, koncerto de la ĥoro *Eĥo*. Tre interesa estis la koncerto de baritono Jerzy Gałeczki, iama “stelo” de la kabaredo *Verda Simio*, kaj la koncerton gvidis ege humure aŭtoro de la kabaredaj tekstoj — Roman Dobrzyński. Kantis por ni kortuŝe gejunuloj el la lernejo *Zamenhof*, dancis kaj kantis “triaĝuloj” kaj popola ensemblo familia, kaj fine JoMo dancigis multajn — ne nur junulojn.

La lodzanoj sukcesis informi pri la kongreso gazete, radie kaj rete. Estis aranĝita porokaza poŝta stampo, presitaj poŝtkartoj kun la signoj de la Eŭropa Jaro de Interkultura Dialogo kaj Nacia Centro de Kulturo.

La sekva TEK okazos en 2010, probable en Nowy Sącz, en montara regiono sud-oriente de Krakovo.

Halina Komar

Dia Regno kaj *Dia Regno*

Entute 46 partoprenantoj el 12 landoj kunestadis en la kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en la hotelo *Esperanto* en Pribylina (Slovakio) je la monaŝanĝo julio-aŭgusto.

Dum la semajno la kongresanoj havis la eblecon partopreni en diversaj programeroj, ekzemple: naturaj ekskursoj, komuna kantado, diverstemaj prelegoj, diservoj, muzika vespero, korpaj ekzercoj ktp.

La ĉefa temo estis *Dia Regno*, ĉar ĉi-jare ĉi tiu gazeto celebras sian 100-jariĝon. Ne nur la gazetan *Dian Regnon* oni pritraktis dum la kongreso sed ankaŭ la “Dian” Dian Regnon. Inter la prelegantoj estis, interalie, Stano Marček, la redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj aŭtoro de la konata lernolibro *Esperanto per rekta metodo*, kiu jam estas tradukita al dudeko da lingvoj.

Muzikistoj el Slovakio, gvidataj de Petr Sarnovsky, kiuj ofte koncertas okaze de diversaj Esperanto-renkontiĝoj ĝuigis la aŭskultantojn dum unu vespero. La nombro de partoprenantoj ebligis al ĉiuj konatiĝi kaj paroli kun ĉiuj, kreante familian etoson.

Bengt Olof Åradsson

Verdaj ruĝuloj en Roterdamo

Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK) konferencis en Roterdamo antaŭ la 93a UK. Ĝi kolektiĝis sub la ruĝa standardo en frata organizo “Rode Morgen” (ruĝa aŭroro).

La nova estraro estis demokratie elektita per leteraj voĉdoniloj. Stan Keable (Britio) restos prezidanto de IKEK; la ceteraj estraranoj estas: Maria Prilepskaja (Ruslando), Johano Petik (Hungario), Luis Serrano Pérez (Hispanio), Dieter Rooke (Svislando), Alcino Ramos (Portugaliao).

K-do Natinš faris prelegon pri la fusilistoj en Latvio, apoge al la Ruĝa Armeo, k-do Rooke pri porlaborista Esperanto-gazetaro, k-dino Prilepskaja pri la malfacila jaro 1937.

La konferenco publikigis rezolucion kontraŭ la kampanjo de okcidentaj amasmedioj pri Tibeto kaj olimpiaj ludoj. Ĝi salutis la evoluon de socialismaj latinamerikaj ŝtatoj kaj menciis la kongreson de socialistoj en Minsk.

La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller aparte esprimis bondeziron al IKEK, kiu jam dum dek jaroj estas kunlaboranta organizo en UEA.

Dieter Rooke

La lodza kongresano (Fotis Andrzej Sochacki)



Du centjariĝoj en Dresdeno

De 27 jul ĝis 1 aŭg 2008 okazis en Dresdeno (Germanio) la 38a Internacia Vegetarana Kongreso, organizita de International Vegetarian Union (Internacia Vegetarana Unuiĝo — IVU).

IVU, same kiel Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA), festis sian centjariĝon en Dresdeno en ĉeesto de entute pli ol 600 vegetaranoj kaj veganoj el pli ol tridek landoj. Nome de TEVA, aktive partoprenis tri el ĝiaj estraranoj: prezidanto Christopher Fettes, vicprezidanto Francesco Maurelli, kaj sekretario Heidi Goes.

Inter la dekoj da prelegoj pri ĉiuspecaj aspektoj de vegetaranismo, kiuj okazis dum la kongreso, estis ankaŭ du rilataj al Esperanto. Lunde, la 28an de julio, Christopher Fettes parolis pri internacia amikeco inter vegetaranaj familioj pere de Esperanto, kaj montris fotojn pri internaciaj Esperanto-renkontiĝoj kie partoprenis multaj infanoj. Francesco Maurelli, vendrede, la 1an de aŭgusto, parolis pri la historiaj kaj ideologiaj ligoj inter la vegetarana kaj Esperanta movadoj.

La vegetaranoj miris pri tio, ke la esperantistoj multe kontribuis al la fondo de la Internacia Vegetarana Unuiĝo. Fakte la vegetaranoj, antaŭ cent jaroj, decidis kunveni en Dresdeno por fondisian unuiĝon pro tio, ke la esperantistoj jam planis tie okazigi la kvaran Universalan Kongreson.

Ambaŭ prelegoj allogis dek kelkajn partoprenantojn, kaj inter ili pluraj petis pli da informoj aŭ starigis demandojn kiuj montris sinceran interesiĝon. Lunde anonciĝis kurseto pri Esperanto kiu okazis ĉiutage dum la kvar sekvaj kongrestagoj. Partoprenis la lecionojn homoj el diversaj landoj (Germanio, Usono, Aŭstrio, Hinda Unio, Britio...) kaj aĝkategorioj.

Dum la tuta kongressemajno, TEVA havis budon, kiu montris Esperantajn tradukojn de famaj verkoj kaj komiksoj, originalan literaturon kaj germanlingvajn informfoliojn pri Esperanto. Du esperantistoj el Dresdeno kelkfoje vizitis la budon kaj kundedoris. Kelkfoje homoj tiom entuziasmiĝis, ke ili tuj surloke komencis lerni la lingvon. Ni sukcesis montri al la kongresanoj ke Esperanto daŭre ekzistas kaj nia amikema sinteno rezultis en multaj bonaj kontaktoj. Sed ne nur tio: kelkaj el ili serioze pripensas partopreni en la venonta UK!

Francesco Maurelli
Heidi Goes



TEVA digne prezentis sin kaj Esperanton en Dresdeno.

Eniru la realajn temojn

Eŭropa Verda Partio okazigis 28–31 aŭg la unuan Someran Universitaton ambaŭflanke de la limrivero Odro en Frankfurt/Odro (Germanio) kaj Słubice (Pollando). Apud ekskursoj kaj artaj prezentoj, renkontiĝoj kun verkistoj, filmoj k.s. kunsidis pluraj laborgrupoj.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) okazigis 30 aŭg laborgrupon “Lingva Politiko — la Potencialo de Esperanto”. Enkondukis ĝin d-ro Manfred Westermayer, sekretario de AVE, rakontante pri la celoj de AVE kaj la kunlaboro kun la Verdaj Partioj ekde 1984.

D-ro Diana Siebert, plurlingva kaj sperta pri la trilanda kunlaboro de verduloj en la Heerlen-Grupo, menciis la lingvo-problemojn inter la verduloj kaj klarigis la malfacilaĵojn de la angla, ne tro taŭga kiel internacia lingvo, kompare kun la teknikaj avantaĝoj de Esperanto. Ŝi avertis la Esperanto-movadon: malpli aktivu inter si, sed eniru la realajn temojn — kion fakte faras AVE.

D-ro Seán Ó Riain, diplomato kaj prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, prezentis la tri gravajn lingvo-politikajn “raportojn” en la Eŭropa Parlamento (EP): Dell Alba en 2004, Grin en 2005, Maalouf en 2008. Li rakontis pri la nova grupo (Geremek-grupo) en EP, fondita por diskuti la lingvajn problemojn, kaj esprimis la deziron ke al ĝi aliĝu verd-partia EPano.

Westermayer prezentis la proponon de AVE, ke la potencialo de Esperanto kiel relaksa lingvo estu pruvita en (unu el la komitatoj de) EP dum plurjara eksperimento. Sed tio estis taksata kiel tro frua postulo.

Sekvis vigla diskuto. Tradukisto grumblis, ke li ne pretas lerni Esperanton. Laŭ kelkaj junulinoj al Esperanto mankas avantaĝoj, kulturo kaj idiomaj aĵoj. Tion la ĉeestantaj esperantistoj per propraj spertoj rifuzis. Alia riproĉo rilatis al la manko de allogeco en Esperanto.

Finfine oni interkonsentis pri tri ĉefaj rezultoj de la laborgrupo:

1. Inviti verdan EPanon al la Geremek-Grupo de EP por puŝi la rolon de Esperanto en la lingvo-lernado (prope deŭtika utilo) cele al eŭropa identeco.
2. Esperanto estas vivanta lingvo kun propra kulturo (originala kaj tradukita literaturo, teatraĵoj, kantoj kaj kanzonoj, denaskaj parolantoj, pacema historio kaj lingva evoluo).
3. Postuli ke la Komitato por Kulturo kaj Edukado de EP mendu sciencajn esploron pri la kontribuo de Esperanto al la interkultura dialogo.

Manfred Westermayer

Foshan: Esperanto + la hispana

Ĉe la altlernejo pri porprofesiaj studoj en la ĉina urbo Foshan 9 sep komenciĝis baza kurso de Esperanto.

Aliĝis al la kurso ĉ. 60 gelernantoj kun granda entuziasmo. Ŝajnas ke la kurso estos sukcesa, ĉar la junaj gelernantoj esprimis sian grandan deziron lerni ĉi tiun lingvon. Instruas Augusto Casquero, hispano, kiu ankaŭ okupiĝas pri la kurso de la hispana lingvo en la altlernejo. Helpos lin Peng Jin, mem esperantisto kaj direktoro de la altlernejo, kaj Liu Weizhuang, ĝenerala sekretario de la Esperanto-Asocio de Kantono.

Augusto Casquero



FEJO-tendaro en Pori: Alia kaj Patrik gajas dum la rostado. (Fotis Robert Bogenschneider)

Finnlando: somerfina tendaro

22–24 aŭg grupo da finnaj esperantistoj sekvis alvokon de FEJO (junulara sekcio de esperantistoj en Finnlando) al tendaro en urbo Pori, kiu celebras ĉi-jarsian 450-jariĝon. Ni estis en kampadejo de Yyteri, kiu estas en Finnlando konata pro sia nature valora kaj unika ĉemara duna plaĝo.

La partoprenantoj povis elekti inter naturproksima tendoj kaj komforta dometo, kie estis ĉiuj bezonataj ekipaĵoj kaj eĉ saŭno. Saŭnumado kaj naĝado en maro estis ja grava parto de nia tendaro. Vendrede vespere okazis eĉ ekzotika noktomeza naĝado en la iomete freŝa maro dum nur luno donis lumon al ni. Ĉiuj ĝuis la unikan etoson kaj la lastajn eblecojn naĝi dum finiĝanta somero.

Kiel decas por tendaro, okazis ankaŭ rostado. Ĉiuj tagmanĝoj estis pretigitaj sur fajro, kaj malgraŭ kelkaj plenbruligitaj kolbasoj ni sukcesis krei sufiĉe altkvalitan kaj eĉ bongustan menuon. Alia komuna atrakcio estis minigolfo. Ni ludis en du teamoj, kiuj bonhumore batalis pri venko. Finfine pli sukcesa teamo gajnis kaj ricevis aplaŭdon. Kiel plian programeron ni spektis premiere kelkajn el la tre amuzaj epizodoj de *Ŝafo Ŝaŭn* (angle *Shaun the Sheep*, brita animacia serio). La filmetoj estis projekciitaj sur la muron de nia dometo kvazaŭ en kinejo.

Dum la semajnfino fejoanoj daŭrigis sian tradicion elekti la plej afrodizian kovrilpaĝan bildon inter la pasintjaraj numeroj de *Esperanta Finnlando*. Ĉi-foje la nomumon ricevis numero 5/2007, kies bildo estas fotita en Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando en oktobro 2007.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj kaj venintoj, ke rezultis agrabla finsomera renkontiĝo!

Paula Niinikorpi

Neniam oni vidis tian kongreson

22–29 aŭg okazis en Grosseto la itala kongreso de Esperanto. Grosseto estas en Toskano, en la centro de ekse marĉa regiono, Maremo, kies oficiala epiteto estis maldolĉa. Sed de longa tempo Maremo iĝis prospera kaj dolĉa regiono.

La plej grava aspekto de la ĉi-jara kongreso estis informado al neesperantistoj, kiun donis ĵurnaloj kaj televidstacioj. Oni komencis en la alven-tago per gazetara konferenco en la urbodomo fare de la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio kaj de la vic-urbestro. Ĉiutage aperis unu-du artikoloj kaj kelkaj lokaj dissendoj televidaj. Esence ĝi aspektis vera kongreso, pri kiuj parolas ĵurnaloj, kaj ĉiuj loĝantoj de Grosseto kaj de la regiono eksciis pri Esperanto kaj pri la eblecoj lerni ĝin en Grosseto. La merito apartenas al la grosetaj esperantistoj, kiuj estas integra parto de la urbo.

Dum la kongreso mem estis abunda programo kun kursoj pri Esperanto por novuloj kaj progresantoj (instruis Anna Löwenstein kaj Luigia Madella) kaj kun tri seminarioj por spertaj esperantistoj: informado (gvidata de la vicprezidanto de la franca landa asocio, François Bartsch), lingvo-instruado (gvidata de Stano Marček, la aŭtoro de la furora rektametoda lernolibro) kaj informadiko (gvidata de Claudio Imbrenda, juna informadikisto-esperantisto el Pisa). Ĉi tiuj seminarioj estis bone vizitataj de la kongresanoj dum tri tagoj. La jaŭdo kaj la vendredo de la kongresa semajno estis dediĉitaj al ekskursoj.

Kiel ĉiu respektinda kongreso ankaŭ la itala kongreso estis inaŭgurita kaj solene fermita. Dum la inaŭguro festparolis Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio. Dum la solena fermo oni ankaŭ kantis la himnon. Okazis la nemalhaveblaj diskutoj dum la asembleo de la membroj, la voĉdonado pri la raporto de la estraro, la katolika di-servo en la katedralo kaj la vesperaj spektakloj (la konataj italaj esperantistaj kantistoj: Ĝanfranko kaj Marĉela kaj Pjero Nisim). La tuton garnis ĥoro de knabinoj el pola lernejo, kiu partoprenis kaj la kongreson kaj la lokan marbordan strandon dum la tago.

Aparta specialaĵo estis la prezentoj de libroj en Esperanto por la kongresanoj kaj por la loka publiko. Mi neniam antaŭe vidis nacian publikon, kiu interesiĝas pri libroj en Esperanto. Sed Grosseto estis alia, ĉar kelkaj el la novaj libroj rilatas al Grosseto kaj al lokaj verkistoj,

kiel Luciano Bianciardi, kies verko *La vivo agaca* estis tradukita al Esperanto de Carlo Minnaja.

Italaj decidis konkurenci kontraŭ afrikaj esperantistoj pri piedpilka ludado kontraŭ lokuloj. Nun jam estas la dua jaro, kiam niaj junuloj defias la lokajn neesperantistojn. Nu, niaj ludantoj evidente pliboniĝos, ĉar ni malgajnis nur per 8 kontraŭ 0. Venontan jaron certe ni povos malgajni per 5 kontraŭ 0.

Renato Corsetti

Internacie en Bretonio

Pli ol 150 esperantistojn el dek landoj allogis la 12a esperantista renkontiĝo en la bretonia urbo Plouezec [Pluezek]. Multnivela kurso ekde nululoj kaj infanoj ĝis la supera grado estis brile organizitaj far Jean Louis le Brizault.

La loka lernejo gastame disponigis siajn klasĉambrojn por lecionoj kaj atelieroj. Ne nur profundigi en la lingvon povis partoprenantoj kun helpo de spertaj instruistoj el Britio, Pollando, Germanio, Ruslando, Francio, Nederlando, sed ankaŭ partopreni posttagmeze atelierojn kaj kursojn pri botaniko, teatro, joko, ĉina lingvo, informadiko (du niveloj). La kurso de Atilio Rojas por instruantoj vekis neordinaran intereson eĉ inter novuloj. Ne mankis ankaŭ prelegoj, ekzemple, pri la Pola Radio (Barbara Pietrzak), historio de E-kantoj (Bill Chapman), botaniko (Alain Delmott). Funkciis riĉa libroservo kun centoj da titoloj.

Posttagmezaj ekskursoj — ĉiam du paralele — malkovris al la partoprenantoj ĉarmegajn ĉirkaŭaĵojn de Plouezec: klifojn, abatejon de Bauport, neforgeseble kvieta urbon Tregastel kun la rozgranita marbordo, muzeon de bretonaj kostumoj en Paimpol k.a.

Varia vespera programo neniam lasis indiferenta, ĉie fulmis fotiloj kaj kameraoj. Jam de kelkaj jaroj instruataj surloke bretonaj dancoj logas al la vesperoj turistojn kaj loĝantojn de Plouezec. En la loka preĝejo esperantistoj aranĝis impresan koncerton de klasikaj gitaristoj Mauricio Diaz Alvarez kaj Roger Eon.

Mirindaj skulptaĵoj, ĉizitaj de Marie Eon el arbotrunkoj — siaspeca lingvo — ornamis dum la tuta semajno la renkontiĝejon.

Kronis la tuton adiaŭa vespero kun maristaj kantoj, teatraĵoj, bongustega manĝo kaj larmoj en okuloj.

Roger Eon

Mini-Munkeno jam la sesan fojon kun Esperanto

Mini-Munkeno (Mini-München) estas la unua kaj ankoraŭ unu el la plej grandaj feriaj infanurboj de la mondo. Ĝi okazas ĉiun duan jaron en la Olimpika Parko de Munkeno. La Munkena Esperanto-Junularo kune kun la Esperanto-Klubo de Munkeno ekde 1992 ofertas lingvajn kursojn en la kadro de Comenius-altlernejo tie, kaj jam la sesan fojon sinsekve oficiale kunlaboras en la organizado.

Ĉi-jare Mini-Munkeno okazis en aŭgusto, denove en la *Event-Arena* — la bicikla stadiono de la Olimpikaj Ludoj de 1972. Ĉi-foje esperantistoj kunorganizis lingvokonkurson, en kiu estis ankaŭ Esperanto. Krome ni instruis Esperanton al pli ol 200 infanoj kaj informis al kelkaj miloj da infanoj, ke Esperanto ekzistas.

La varbefiko por Esperanto estas granda, ĉar ne nur sur kvin mil afiŝoj estis presita “Münchner Esperanto-Jugend”, sed ĉar ankaŭ en pli ol 12 mil programkajeroj estis indikita la Esperanto-klubo. Krome ni havis eblecon disdoni informmaterialon.

La ludurbon vizitis gazetaro kaj televido, delegacioj de pedagogoj el aliaj landoj kaj tri ambasadoj.

Fritz Hilpert

SEFT en la sama tendejo

SEFT (Somera Esperanto Feria Tendaro) okazis 26 jul – 2 aŭg 2008 la 31an fojon sur la sama tendejo sur la limo inter Brandenburgio kaj Meklenburgio. La tendejo situas inter du puraj lagoj, meze en arbaro de la brandenburgia-meklenburgia lagaro-regiono.

Ĉi-jare partoprenis pli ol 70 personoj — forta infano-grupo kaj “reprezentantoj” de ĉiu aĝo. La celo de tiu aranĝo estas ĝui naturon, tendumi kun Esperanto-amikaro, iom lerni. Ĉiu devas zorgi pri si mem (tendo, tendumaĵoj, manĝo ktp.) kaj kunaranĝi la programon. Laŭ deziro oni povas partopreni sportojn, migradojn, ekskursojn... Posttagmeze, ĉiutage okazis kafoklaĉoj kun diskutoj kaj prelegetoj. Tre ŝatataj ne nur por infanaro, sed ankaŭ por plenkreskaj homoj estis la vesperaj fabel-horoj kun lumbildoj.

La kulmino ĉi-jare estis, kiam SEFT-ano Nils Audoersch ĉirkaŭflugis la tendejon (vd. foton en la 27a paĝo).

Werner Pfnennig



“Ili ĉiuj parolas Esperanton” (Fotis Bernhard Romanowski el “Kölner Stadtanzeiger”)

SOMERE en kamparo kaj arbaro

“Sie alle sprechen Esperanto” (ili ĉiuj parolas Esperanton) estis la fraplinio de raporto en la Kolonja gazeto *Kölner Stadtanzeiger*, kiu priskribis la 6an Someran MEzeŭropan RENkontiĝon. Afabla teksto kun bildo priskribis la renkontiĝon, substrekante, ke ĉeestis trideko da gastoj el sep landoj, kaj prezentante nian lingvon. Raportis ankaŭ la regiona radio kaj atendeblas plia artikolo en alia gazeto, kiu pli ĝenerale priskribos la lingvon.

Entute estis 34 homoj, kiuj partoprenis dum kelkaj tagoj aŭ dum la tuta renkontiĝo SOMERE de EsperantoLand en la vilaĝeto Kall-Krekel (meze inter Kolonjo kaj Trier en la mezalta montaro Eifel), kiu daŭris de 1 ĝis 17 aŭg 2008. Aldone ses Esperanto-parolantoj venis dumtage por viziti nin. Ĉeestis ok infanoj kaj junuloj, kiuj ĝuis la ĝardenajn ludinstalaĵojn kaj partoprenis aŭ organizis aliajn ludojn.

Kiel kutime la plimulto de la partoprenantoj venis el eksterlando — ĉi-foje estis 24 — kaj do la kunveno estis agrable internacia kaj Esperanto estis la kutima ĉiutaga lingvo en nia dumtempa vilaĝeto de EsperantoLando. Sekve la progresantoj troviĝis ĉiam ĉirkaŭitaj de Esperanto-parolado, ne nur en la kursoj kaj lingvaj ekzercoj, kiujn gvidis Jean-Luc Kristos kaj Gunter Neue interalie helpe de la Mazi-filmo. (Proksimume triono de la partoprenantoj eklernis Esperanton dum la pasintaj kvin jaroj kaj pliprofundigis en la lingvon dum la ekzercoj.)

La koncerto de Kim Henriksen kun

lia filo Villads prezentis delonge konatajn kaj kelkajn surprizajn novajn pecojn. Villads produktis tiom impresan varion de langoklakaj kaj similaj sonoj, ke oni petis lin fari apartan kurson pri tio, je kio li volonte cedis. Prelegon pri Esperanto-literaturo faris István Ertl spicante tion per eta kvizo. Danka Leyk igis nin konsciiĝi pri niaj atendoj en amrilatoj kaj detaligis problemojn de remalkovro de la unua amo.

Krome ni malstreĉiĝis per gimnastiko kaj jogo, ni dancis kaj spertis nin mem kaj niajn sensojn, ni ludis tablotenison kaj ŝakon kaj vespere diversajn pliajn tabloludojn kaj kunmetis du- kaj tridimensiajn puzlojn. Daŭre logis la ĝardeno, kiu estas tre oportune ligita al la ĉefa salono, tiel ke ofte por manĝoj, kafumado kaj babilado homoj facile translokiĝis eksteren. Vespere ni dufoje krastrostis kaj ĝuis bivakan fajron.

En la ĉirkaŭaĵo estas agrabla miksaĵo de kamparoj kaj arbaroj, kio logis nin al multaj promenoj; kelkfoje ni aldone serĉis kaŝitajn objektojn (troveblajn helpe de satellite bazita poziciiga aparato; *geokaŝado*). La pli distancaj ekskursoj gvidis nin al mezepoka vilaĝo, kastelo, naturpado kaj imponaj restaĵoj de la romia tempo, interalie trinkakva kanaletto kondukanta al Kolonjo.

En la fina nokto la luno estis tiel afabla dumtempe kaŝiĝi de la suno malantaŭ la tero, kaj ni povis spekti partan luneklipson. Tiel finiĝis du semajnoj, de kiuj restos en memoro certe ankaŭ la brilaj kapabloj de nia afabla kuiristino, kiu provizis nin interalie per granda vario de desertoj kaj kukoj.

Lu Wunsch-Rolshoven

En la argentina *Newsweek*

20 aŭg en *Newsweek Argentina*, landa hispanlingva versio de la internacia magazino *Newsweek* aperis ampleksa intervjuo kun grupo da argentinaj viki-aktivuloj, kiuj okupiĝas pri la hispanlingva *Vikipedio*.

Inter la intervjuitoj estis ankaŭ esperantisto Fernando Inocencio, aktivulo de ArgentEJO kaj membro de la landa asocio AEL. Li estas videbla sur la kovrilpaĝo de la magazino. En la intervjuo Fernando rakontis pri sia esperantisteco kaj la Esperanta *Vikipedio*.

Roberto Sartor



Subĉielaj lecionoj

Post la julia leciono en la Domo de Monáho Galvão (*LOdE*-8/9, pĝ. 11) grupo da geesperantistoj de Lorena veturis 15 aŭg al San-Paŭlo por viziti tie la muzeon de la portugala lingvo.

Al la grupo surloke aliĝis kelkaj gesamideanoj el San-Paŭlo, kaj dum kelkaj horoj ili kune trairis la tutan ekspoziciaron. La portempa ekspozicio temas pri la brazila verkisto Machado de Assis. Pro tio José Roberto Tenório, posedanto de la eldonejo *Oportuno*, donacis al la Muzeo tri librojn de tiu grava verkisto tradukitajn al Esperanto.

Oni fotiĝis kun la Esperanta flago kaj kaptis la okazon pliriĉigi sian vortostokon: kion precize signifas la vortoj *romano*, *novelo*, *rakonto*, *fabelo*, *fablo*, kaj kion signifas la vortoj *ironio*, *sarkasmo*, *moko*, *ŝerco*, *ciniko*?

Ĉiuj kunportis hejmen flugfoliojn pri la muzeo kaj pri Machado de Assis, kaj ties esperantigitan rakonton *Kiel oni inventis almanakojn?* kiu taŭge ilustras la ironieman stilon de ĉi tiu brazila aŭtoro. La agrabla ekskurso estas iniciato de Lorena Esperanto-Klubo — *Subĉielaj Lecionoj*.

Paulo Sérgio Viana

Por kunlaboro inter universitatoj

17–18 jul 2008 kunvenis proks. 50 fakuloj el 39 universitatoj kaj esplorinstitutoj en 23 landoj por interŝanĝi interlingvistikajn spertojn. Gastigis ilin Wim Jansen ĉe la Universitato de Amsterdamo. La konferencon, kiu estis subtenita de Esperantic Studies Foundation, prezidis Humphrey Tonkin.

La kunveno estis preparita per interŝanĝo kaj intensa legado de materialoj pri interlingvistikaj projektoj en universitatoj en la retejo de ESF. En Amsterdamo oni ĉefe pridiskutis la sekvajn tri temojn:

- (1) Studprogramoj kaj kursmaterialoj pri Esperanto kaj interlingvistiko;
- (2) Interŝanĝoj de instruantoj, studentoj kaj materialoj;
- (3) Administra starigo, daŭrigo kaj fortigo de programoj.

Montriĝis, ke la studprogramoj pri interlingvistiko kaj Esperanto en la unuopaj universitatoj estas ege diversaj. Ĉefe okazas praktikaj lingvaj kursoj, kelkfoje tiuj enhavas la studadon de Esperanto-kulturo, manpleno da universitatoj havas enkondukon al Interlingvistiko/Esperantologio en siaj programoj.

Pli detale Wim Jansen prezentis la studadon pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Amsterdama universitato kaj Sabine Fiedler informis pri interlingvistika modulo (kombinaĵo el prelego, seminario kaj lingvokurso) en la Universitato de Leipzig. Necesas detala listigo de la programoj. La admirinda longjara laboro de Germain Pirlot pri la temo estas bona elirpunkto por tio.

Katalin Kováts prezentis la retejon edukado.net, kiu estas konvena kolektejo de materialoj kaj interŝanĝejo de ideoj kaj projektoj. Katalin Kováts, kiu prizorgas ĝin, tuj post la konferenco instalas specialan lokon en la retejo dediĉitan por universitatoj.

Ĉefa konkludo estis la plano verki manlibron pri interlingvistiko en la angla lingvo kun la celo traduki ĝin al aliaj lingvoj kaj unuavice al Esperanto. Tiu libro enhavu ĉapitrojn pri ĉefaj aspektoj rilate al interlingvistiko/esperantologio, kiel lingvoplanado, lingvoekonomiko, la rolo de planlingvoj en la intelekta historio kaj aliaj. Krome necesas havi bone prezentitan kaj sciencajn libron pri Esperanto por prezenti la fakon serioze en lingvistikaj rondoj. Same tiu estu verkata unue en la angla por poste traduki ĝin al aliaj lingvoj. Hokan Lundberg jam komencis skizi enhavon de tia verko.

Krome oni diskutis pri la ebleco organizi somerajn kursojn, kiuj estos agnoskitaj en la universitata medio kaj pli sisteme kolekti diplomlaboraĵojn kaj disertaciojn, kiuj rilatas al interlingvistiko kaj Esperanto, por ke ili estu rete alireblaj. Ni utiligu la ekzistantajn universitatajn interŝanĝprogramojn (Sokrates/Erasmus, DAAD) por niaj celoj. Gravas uzi Esperanton en interdisciplina laboro por ke ĝi trovu nature sian rolon en aliaj studkampoj. Por altigi la profilon de Esperanto kaj interlingvistiko en la universitata medio krome respektataj gastprofesoroj estu invitataj. La nuntempaj reformoj en la universitata medio en Eŭropo (Bologna procezo; Referenckadro) unuflanke limigas nian flekseblecon sed aliflanke ankaŭ malfermas novajn pordojn.

Multaj temoj meritis pli multan diskutadon ol eblis dum la dutaga konferenco. Estis proponite pro tio, ke la venonta ILEI-konferenco (Krakovo, 18–25 jul 2009) okupiĝu interalie pri universitata kunlaboro por daŭrigi la dialogon.

Sabine Fiedler

Cseh-Seminario en la Cseh-Domo

“Zamenhof kreis la lingvon, kaj Cseh la metodon por instrui ĝin”, — oni kutime diras. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo, iniciatita de Andreo Cseh kaj uzita de elstaraj instruistoj de nia historio kiel Hendrik Seppik, Julio Baghy, Sigismundo Pragano, Lidja Zamenhof kaj aliaj.

La seminario okazos inter 31 okt kaj 2 nov 2008. Ĝi estas destinita al instruistoj de Esperanto, kiuj volas studi la metodon de la fama Esperanto-pedago Andreo Cseh kaj trejniĝi en la plej aktualaj teknikoj de rektmetoda lingvoinstruado. La seminarigvidanto estos Atilio Orellana Rojas.

La instruado okazos en la Cseh-Domo, la sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto (Hago, Riouwstraat 172), fondita de Andreo Cseh kaj gesinjoroj Isbrucker.

Ĉiu partoprenanto ricevos lernomaterialon, sed ne la libron *Baza Cseh-Kurso* (deviga literaturo por ĉi tiu seminario) kaj fine de la seminario ateston pri ĉeesto en la Seminario. La lernomaterialo estas inkluzivita en la kotizo.

La kotizo povas esti pagita surloke, sed necesas frue aliĝi, ĉar sen aliĝo de almenaŭ ok personoj, la seminario ne okazos.

Atilio Orellana Rojas

364 mil diskoj pri Esperanto!

En enorma kvanto de 364 mil ekzempleroj estis eldonita en Pollando la kompaktdisko *Esperanto* la 10an de septembro en la pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza*.

La disko aperis kiel senpaga suplemento en la tuta eldonkvanto de tiu tagĵurnalo. La diskon kreis organizo E@I, surbaze de la mendo de la urbo Bjalistoko, kun kiu estis en januaro subskribita oficiala kontrakto. La eldonon de la disko pagis la venontjara UK-urbo Bjalistoko.

Pluraj polaj esperantistoj aĉetis po 10–20 gazetoj kun la celo sekve disdoni ĝin al siaj konatoj kiel taŭgan kaj malmultekostan informilon.

Ideo de la disko *Esperanto* estas promenado tra kvazaŭ fabela, virtuala Bjalistoko kaj vizitado de unuopaj konstruaĵoj de la urbo. Ĉiu el ili havas sian apartan signifon. Tiel aperas konstruaĵoj kiel *Lernejo* (kursoj de Esperanto de kelkaj niveloj), *Muzikejo* (kantoj en Esperanto kun tekstoj), *Kinejo* (Filmo *Esperanto estas...*), *Gazet-ĝiceto* (prezento de kelkaj gravaj Esperanto-gazetoj, inter kiuj ankaŭ tri numeroj de *La Ondo*), *Esperanto-muzeo* (informoj pri Zamenhof, pri aranĝoj, organizoj...), *Biblioteko* (kelkaj famaj verkoj en Esperanto)...

La vizitantojn bonvenigas en la urbodomo la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, per mallonga videaĵo, salutante en la pola kaj en Esperanto.

Ĉe la kreado de la disko helpis multaj esperantistoj (tradukado, verkado, enhavo mem), al kiuj ni kore dankas (ankaŭ al la redaktoroj de *La Ondo*).

Estante E@I pripensas krei similan multlingvan DVDn kun la sama inform-celo. Por tio tamen estas necesa helpo kaj kunlaboro de pluraj Landaj Asocioj aŭ aliaj Esperanto-organizoj. Kaze de intereso pri simila disko por via lando aŭ via organizo, bonvolu kontakti la estraron de E@I ĉe: estraro@ikso.net

Peter Baláž
kunordiganto de E@I



Ĉefpremio pro Esperanto

En la vojevodia artkonkurso por lernantoj *Proksimiĝu al la mondo!* okazinta en Krakovo fine de la lernojaro (vd. *LOdE-165*, pĝ. 10), la ĉefpremiion (Grand Prix) de **la tuta konkurso** gajnis la prezentantino de esperantlingva programo, 15-jara prapranepino de Antoni Grabowski, Natalia Dobrowolska (vd. *la supran foton*). Ĉirkaŭ mil lernantoj partoprenis la konkurson kun programoj en la angla, germana, franca kaj Esperanto. Ĉi-foje “venkis” Esperanto.

Kiel parton de la premio Natalia ricevis plenan vojaĝsubvencion kaj unu-semajnan restadon en Britio, kun partopreno en kurso de la angla lingvo — premio volonte akceptita de ŝi (alia eblo estis ferio en Sicilio por du personoj). Dum la restado en Britio ŝi povus fari la prezentadon. La posteulino de la “Patro de la Esperanta poezio” faros ĝin venont-jare en la Konferenco de ILEI en Krakovo, unu semajnon antaŭ la 94a UK en Bjalistoko.

Natalia gajnis, kompreneble, ankaŭ la unuan premion en la kategorio “Esperanto”, grupo “Gimnazioj”. Ŝi prezentis fragmenton el *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz pri la ĉas-komenca korn-ludo de Vojski en la traduko de sia prapraavo Antoni Grabowski. En la poemon ŝi lerte enplektis kanton. Antaŭe, ŝi jam brile sukcesis en nacilingvaj kant-konkursoj.

La unuan premion en la kategorio: “Esperanto”, grupo “Elementaj lernejoj” gajnis lernantoj de la lernejo *Zamenhof* en Zagornik.

Maria Majerczak

Gaston Waringhien en la Esperanta Panteono

Okaze de vizito de kelkaj gesenatanoj el diversaj politikaj grupoj ĉe la urba kremaciejo de Ĉaŭdefono, la Konsulo de la Esperanta Civito anoncis la firman intencon okazigi la 14an (fakte la 12an) de aprilo 2009 la unuan solenan Memortagon pri niaj pioniroj, kun dediĉo de la unua urno en la Esperanta Panteono.

La konstruaĵo, vera juvelo de la secesia stilo, tre pozitive impresis la parlamentanojn.

“La elekto baziĝos sur la listo de la cent plej famaj esperantistoj, preparita antaŭ kelkaj jaroj. Certe ni honoros la memoron nur de tiuj kies parencoj konsentas, kaj komencos per tiuj kiuj ligis sian aktivecon al unu el la paktintaj establoj aŭ al la Civito ĝenerale. Tiurilate okazis jam kontakto kun la filino de Gaston Waringhien, kiu longe aktivis por *Literatura Foiro* kaj membris en Esperanta PEN-Centro. Principe ŝi promesis sian ĉeston venontjare, do probable al Gaston Waringhien estos dediĉita la unua urno, — diris c-ano Giorgio Silber, kiu aldonis: — Verŝajne ĝi ne estos la sola dediĉo, sed okazos tre malmultaj, kaj pro la proceduro enkondukita de Lex Bertilia kaj pro la deziro havi la ĉeston de familianoj”.

En 2009 okazos la 150a datreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la 100a de Ivo Lapenna kaj aliaj jubileoj, sed la Konsulo ne komentariis pri ili.

En la vizito ĉe la Panteono la parlamentanoj orientiĝis ankaŭ pri la plej oportuna angulo rezervebla al la esperantistaj urnoj.

HeKo





La Esperanto-stando ĝuis popularecon dum la tuta eduk-ekspozicio en Bonaero.

La 200a elementa kurso de SEK

30 aŭg Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK) festis en Seula Junulargastejo okaze de la 200a elementa kurso de Esperanto.

En la solenaĵo, kiun gvidis Min jung-jin kaj Song Ho-young, salutparolis Lee Jung-kee (la prezidanto de SEK). Sinsekvis gratulparoloj de Park Wha-Chong (prezidanto de KEA), Kim Kwang-soo (prezidanto de Esperanto-Asocio de Ŭonbulismo) k.a. Ĉirkaŭ 120 homoj partoprenis en la festo.

Kadre de la celebrado okazis simpozio pri la temo “Kiel verdigi Azion?” kun kvar prelegantoj: Eruda Li (Ĉinio) pri “Fondiĝo de Universala Ligo pri Kulturo kaj Arto (ULKA) por aktuala praktiko de Esperanto”; AGOU Takaŝi (Japanio) pri “Internacia kunlaboro pere de Esperanto, precipe pri la modelo inter Esperanto-Propaganda Asocio kaj Seula Esperanto-Kulturcentro”; SO Gilsu (Koreio) pri “Graveco de Esperantodisvastigo por progresigi la movadon”; Lee Jung-kee pri “La situacio de nuna azia Esperanto-movado”. Post la disdono de diplomoj al la 11 novbakitoj en la 200a elementa kurso, oni ĝuis gaje drinkante, kantante kaj dancante en la amuzvespero. La festantoj tute forgesis tempo-pason ĝis la profunda nokto.

SEK, fondita en la jaro 1991 kaj estrata de Lee Jung-kee, funkcias kiel privata institucio por disvastigi Esperanton kaj stimuli intereson pri la lingvo. Ĝi okazigas Esperanto-kursojn elementajn aŭ mezajn, kaj internaciajn kurskunvenojn per kaj por Esperanto foje kun Namkang Esperanto-Lernejo

en Koreio, kaj foje kun Esperanto-Propaganda Asocio en Japanio.

Ĝis nun 1 416 homoj lernis Esperanton en SEK. Kvankam ne ĉiuj el ili restas en Esperantujo, tamen aktivas por Esperanto-movado multaj entuziasmaj samideanoj, kiuj renkontis la komunan lingvon en SEK.

Lee Jung-kee diris en sia parolado:

“Mi propagandis Esperanton al multaj homoj dum la 17 jaroj, kiam mi administris SEK. Multaj el ili krom la entuziasmuloj malaperis. Tamen mi ne malesperiĝas pro la foririntoj, ĉar mi ofte konvinkiĝas, ke mia afero ne estas vana, dank’ al tiuj, kiuj revenas al Esperantujo eĉ dek kelkajn jarojn post sia foresto”.

La kunfestantoj aplaudis lian sindonemon por la Esperanto-movado.

Kim Uson

vicprezidantino de KEA

Burundio: ses unusemajnaj kursoj

La eduka sekcio de ANEB, la landa asocio en Burundio, dissendis en aŭgusto ses instruistojn al ses vilaĝoj de la provincoj Bujumbura, Bururi kaj Makamba.

La celo de la unusemajnaj seminarioj estis, ke oni surloke eksci pri Esperanto kaj eklernu ĝin por ebligi poste fondon de novaj Esperanto-kluboj. La instruistoj uzis la kirundan kaj francan kiel la laborlingvojn, ĉar en la vilaĝoj oni parolas la kirundan lingvon, kaj en lernejo oni instruas en la franca. Entute, 96 novaj gelnantoj sekvis la seminariojn.

Hasano Ntahonsigaye

Eventoj

Argentino: en eduk-ekspozicio

Ĉiujare dum la vintra feriado, t. e. en aŭgusto, la ekspozicion *Expo Argentina Educativa* en Bonaero partoprenas universitatoj, lernejoj, institutoj kaj komercistoj de lerneja materialo, por montri la tutan variecon de la kursaro kaj karieroj studeblaj en la urbo men kaj en aliaj ĉefaj urboj de la lando.

Komprenoble oni bezonas financian propran standon por partopreni. Tamen post kiam ni sukcesis, ke la Argentina Esperanto-Lernejo estis laŭleĝe aprobita de la ŝtato, oni invitas nin partopreni la ekspozicion senpage kun nia stando.

Do, bonaeraj esperantistoj ĉi-jare denove ornamis sian propran standon kaj volontule deĵoris dum la tritaga ekspozicio, de la naŭa matene ĝis la naŭa vespere, atentante pli ol mil vizitantojn, ĉefe gejunulojn interesitajn pri la lingvo internacia.

Ni disdonis informilojn pri Esperanto kaj faris fulmkursojn kun sukcesa partopreno. En la taga programero aperis ankaŭ speciala prelego pri Esperanto, farita de Aneta Ubik en unu el la aŭditorioj de la ekspoziciejo. Pluraj partoprenintoj enskribiĝis al la Esperanto-kurso, kiu komenciĝis en septembro en la sidejo de la Argentina Esperanto-Lernejo en Bonaero.

Roberto Sartor

La 73an fojon en la Paraĭba Valo

La lastan tagon de ĉi-jara aŭgusto okazis en la Domo de Advokatoj en la urbo Taubat  (ŝtato San-Pa lo) la 73a Esperanto-Renkonto de la Paraĭba Valo. La kunvenintoj unue aŭskultis la protokolon de la lasta renkonto, kiun redaktis kaj legis Milton Serra.

D-ro Maur cio Monken prelegis pri Esperanto kaj religioj. Alexandre Prado pri lumbodoloro, Antonio Pettinati pri “Machado de Assis”. Matene oni debatis pri la provoka temo “Kial Esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn?” kun aktiva partopreno de Sylla Chaves, Jos  R. Ten rio, Paulo S. Viana kaj Antonio Pettinati. Pluraj ĉeestantoj intervenis. Posttagmeze Paulo S. Viana prezentis “guton da gramatiko” pri la temo “Interpunkcio estas grava!”

Dum la Renkonto la eldonejo *Oportuno* proponis siajn varojn. La sekva renkonto okazos en la ŝtato Rio, en baldaŭ difinota urbo.

Paulo S rgio Viana

Sub_18: Esperanto-renkontiĝo nur por gejunuloj

En la lasta semajnfino de aŭgusto en la germana urbo Naumburg la sesan fojon okazis la renkontiĝo Sub_18.

Temas pri speciala renkontiĝo por junuloj en la aĝo inter 15 kaj 25, ĉiufoje nur por ĉirkaŭ dek du partoprenantoj. Tiu negranda partoprenantaro ebligas altkvalitan renkontiĝon, ĉar tiel en la du-tri diversaj lingvokursoj la junuloj bonege povas lerni aŭ plibonigi Esperanton.

Krom la kursoj ĉiam okazas urbo-gvidado, diversaj ludoj, babilrondoj ktp. Dum tiu renkontiĝo oni prezentas kiel grandaj Esperanto renkontiĝoj (IJK, IS, AS) funkcias. Tiel novuloj jam havas ideon kaj ankaŭ kialon iri al pli granda renkontiĝo.

La venonta renkontiĝo Sub_18 okazos 9–12 apr 2009 en la suda parto de Germanio. Pliaj informoj rete: www.esperanto.de/sub18.

Leo Sakaguchi

Ekotur 2008

Dum la lasta aŭgusta semajno okazis en Ĉeĥio tradicia ekoturisma renkontiĝo *Ekotur*, organizita de la kleriga agentejo KAVA-PECH.

La partoprenantoj el Ĉeĥio, Germanio kaj Bulgario loĝis en pensiono en la urbeto Karlštejn, konata precipe pro bela samnoma kastelo. Oni migris tra la montetaro Brdy kaj tra Bohemia Karsto, pitoreska regiono kun belaj profundaj arbaroj kaj kalkŝtonaj rokoj traboritaj per multaj kavoj.

Dumtage unu grupo biciklis kaj la dua piedmigris. Post la vespermanĝoj sekvis ĉiuvespere komunaj programoj, ekzemple projekciado pri la grimado al la pinto de Fuĵi-monto (ĉeestis tri el la rampintoj post la Jokohama UK), konatiĝo kun la Esperanto-libroj de KAVA-PECH, spektado de filmo en Esperanto, aŭ simpla babilado kaj interŝanĝo de opinioj pri konvena varbado por Esperanto kaj simile.

Ni interkonsentis, ke la venont-jara *Ekotur* estu denove dum la lasta kompleta semajno en aŭgusto.

Petro Chrdle

Sur la foto: kelkaj partoprenantoj de *Ekotur* ĉe la monumento omaĝe al la politikaj arestitoj apud la iama ŝtonminejo, nun naturprotektita regiono. (Fotis Petro Chrdle)



Junaj esperantistoj en Naumburg

Eŭropo kaj Germanio kunkongresos

La 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso kaj la 87a Germana Esperanto-Kongreso en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz dum Pentekosto (28 maj – 3 jun 2009) estos eksterordinara kaj vere internacia kongreso, kiu restos longe en la memoro.

Tiu ĉarma, tipe germana urbo meze de Germanio, inter montoj, riveroj kaj lagoj, jam ofertas multon por esperantistaj gastoj, Esperanto estas parto de la ĉiutaga urba vivo.

Unuafoje en la historio la Esperantomovado forlasos sian kutiman kongresojon kaj prezentos sin en la Esperanto-urbo multloke kaj multflanke: ekzemple okazos publika kantado kun lokaj infanoj kaj esperantista kantisto, kongresanoj partoprenos en la procesio okaze de

la tradicia popolfesto, estas planataj vizitoj al firmaoj, lernejoj, kluboj.

Atendos vin varia kulturprogramo dum la nacia vespero: multaj artistoj, muzikistoj, dancistoj kaj ankaŭ prezentantoj el la loka gimnazio, kiu donos hejmon por nia kongreso. Ankaŭ dum la internacia vespero vi trovos abundan muziko- kaj teatroprogramon.

Multaj travivaĵoj atendos vin: krom la lokaj vidindaĵoj, ekzemple, busekskurso tra la pitoreska Harz-montaro, ekskurso al la Eŭropa Rozario (parko) en Sangerhausen, Braunschweig, Goslar (urbo de monda kulturheredaĵo).

La ĉeftemo estas “Esperanto por multkultura Eŭropo”. Herzberg am Harz prezentos sian tradicion urban feston, kie unuafoje ankaŭ Esperanto estos reprezentata per multkultura amikaro. Aparte granda kaj internacia kongreso povos realiĝi en la Esperanto-urbo!

En la eleganta aŭlo de la moderna gimnazio estos teatra salono kun ĉ. 500 sidlokoj kaj krome kvin prelegejoj kun teknikajoj por fakkunsidoj, kunvenoj. En la alo kaj manĝejo de la gimnazio estos ofertataj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj por la kongresanoj.

Tutkore invitas vin je nomo de la urba konsilio kaj administracio s-ro Gerhard Walter, la urbestro de Herzberg / la Esperanto-urbo kaj la surloka LKK.

Organizas la kongreson Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH):

✉ Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg, Germanio

☎ +49/5521/5983

✉ esperanto-zentrum@web.de

<http://ic-herzberg.de>

<http://esperanto-urbo.de>



Unufraze

★ Internacia Studumo pri Turismo k Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) estas registrita ĉe la urbestro de Bydgoszcz kiel Centro de Konstanta Edukado; nun diverslandaj studentoj povos ne nur bakalaŭriĝi, sed ankaŭ magistriĝi ĉe AIS studante dum kvin jaroj en ISTK-AKB-AIS-Klerigejo Bydgoszcz. (ISTK)

★ 3 sep en la jura fakultato de la meksika universitato UNAM post parolado de prof. Luis Kordova k prof. Daniel Moreno (sekretario de Meksika E-Federacio) 25 studentoj-juristoj aliĝis al E-Kurso. (Luis Kordova)

★ Inter pli ol 3 mil partoprenantoj de ĉi-jara Ĝenerala Asembleo de Unitaria-Universalismanoj (25-30 jun, Fort Lauderdale en Florido) estis ses e-istoj, kiuj ĉiutage deĵoris ĉe E-stando; Ron Glossop prelegis pri lingva malegaleco. (*Esperanto-USA*)

★ E-istoj partoprenis en la tradicia somera Parado de Kulturoj en Frankfurto kiel kostumita grupo k disdonis informilojn pri Eo. (*Esperanto aktuell*)

★ Japana E-Instituto ekeldonis japanlingvan broŝurserion *Fronte!*; la unua numero estis pri la Internacia Jaro de Lingvoj, la dua — pri la Praga Manifesto. (*La Revuo Orienta*)

★ Studentinoj Gabriele Ferraro k Anna Miessl prezentis sian filmon *Esperanto por bela mondo* kiel semestran laboron en la Etnologia Instituto de Ludwig-Maximilian-Universitato en Munkeno. (*Esperanto aktuell*)

★ 9 infanoj kun gepatroj k 3 instruistoj de la baza lernejo Bar Hill ĉe Cambridge (Britio) vizitis fine de aŭgusto 2008 la E-urbon Herzberg; okazis utilaj kontaktoj, ekskursoj, komunaj festoj k E-instruado de Tim Morley en la baza lernejo Nicolai en Herzberg. (ICH)

★ La 3a SALO (Somera Arbara Lernejo) okazis en Jemielno (Pollando) kun 20 gelernantoj el Herzberg k Góra. (ICH)

★ Post emeritiĝo de librovendisto Suzuki Kunio k kasisto Takahasi Hiroshi en la Japana E-instituto por tiuj postenoj estas dungitaj respektive Koganei Mariko k Tanaka Sigeru, la direktoro de JEI daŭre estas Isino Yosio. (*La Revuo Orienta*)

★ Svisa interlingvisto Andy Künzli k kantisto-gitaristo Alejandro Cossavella el Argentino estos la ĉefaj gastoj en la 29a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu okazos 29 nov; ĉi tiu Malferma Tago estos la unua post la fino de la renovigo de la UEA-domo, kie nun okazas la lasta fazo de tiu plurjara projekto. (GK UEA)



La unua renkontiĝo de lernu! sukcesis dum SES en Slovakio

Somera Esperanto-Studado (SES) okazis ĉi-jare kun entute la unua malvirtuala renkontiĝo de *lernu!* Ĝin partoprenis 105 personoj de 25 landoj, ekde la plej juna, nur 3-monata ĝis la plej maljuna, 90-jara esperantisto. Ĝi okazis en malgranda slovakia urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava.

La bunta programo konsistis el instruado de Esperanto dum antaŭtagmezoj, posttagmezoj apartenis al ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, kaj vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj: Internacia kaj Nacia Vesperoj, koncertoj, filmspektado, diskoteko...

Instruadon, dividitan al kvin grupoj laŭ lingvo-niveletoj, gvidis kvin spertaj Esperanto-instruistoj: Bertilo Wennergren, Birke Dockhorn, Petra Smideliusz, Dalia Pileckienė kaj Stano Marček. La partoprenintoj ricevis fine de la aranĝo atestilojn pri 26-hora kurso laŭ la niveloj de nova referenckadro de A1 ĝis C1.

La programon rilatan al www.lernu.net prizorgis rekte la tuta teamo de *lernu!*, kiu prelegis, prezentis la projekton, kunsidis kaj diskutis kun la uzantoj. Okazis pluraj specifaj programeroj, baza prezento de la paĝaro, informoj pri la traduk-sistemo kaj vortar-farado, pri teknika aspekto de la portalo, enketo...

La aranĝon organize prizorgis teamo de Esperanto@Interreto (E@I) kune kun SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo), kunfinancis ĝin ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu ankaŭ financas kreon kaj funkciadon de www.lernu.net kaj kelkajn aliajn projektojn de E@I*.

La partoprenintoj taksis SES-on tre pozitive; ankaŭ tial nuntempe organizantoj kune kun *lernu!*-teamo pripensas, kiam kaj kie okazu la venonta SES. Estas planate okazigi ĝin unu semajnon antaŭ IJK, por povi proponi al freŝaj lernantoj plu ĉeesti la junularan kongreson kaj tiel pli enmovadiĝi.

Peter Baláž

* Unuopajn projektojn de la organizo E@I ni prezentos iom post iom en *La Ondo de Esperanto* ekde la novembra numero.

Duafoje en Mongolio

12 jun 2008 okazis la 2a Mongola kongreso de Esperanto en la Universitato Soyol Erdem en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio. Partoprenis ĝin pli ol 40 esperantistoj, inter kiuj estis gastoj el Japanio.

Antaŭtagmeze Dagva Gereltogtokh, sekretario de Mongola Esperanto-Societo prelegis pri la kongresa temo: “Ni efektivigu Esperanto-movadon en Mongolio”, kaj poste Hori Yasuo, estrarano de UEA, parolis pri Azia Esperanto-movado, kaj laste Takashi Agou, direktoro de Esperanto-Populariga Asocio en Japanio parolis pri “Oomoto kaj Universala Homama Asocio”.

Posttagmeze okazis prelegoj: “Esperanto estas internacia lingvo” (por la unuafojaj kongresanoj), kaj “Mongolaj verduloj por ekologio”. Poste okazis fakkunsidoj “Esperanto kaj homaranismo” (por la unuafojaj kongresanoj) kaj “Japana paperfaldarto”. Vespere oni ĝuis bankedon en restoracio kun tradiciaj muzikoj kaj kantoj.

Post du jaroj en Mongolio okazos la 6a Azia Kongreso de Esperanto, kaj mongolaj esperantistoj jam ekpreparas sin por ĝi.

Chimedtseren Enkhee

La Eŭropa Unio aldonas novajn lingvojn

de Dafydd ab Iago el Bruselo

La plej granda espero de preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas la oficialigo de la internacia lingvo en la Eŭropa Unio (EU). Tamen dum la pasinta jardeko oni vidis, kiel la nombro da lingvoj en EU duobliĝis, kaj eĉ lingvoj parolataj de malplimultoj fariĝis kvazaŭ oficialaj.

En 2005 “kunoficialiĝis” la kataluna, galega kaj eŭska. La irlandana, la gepatra lingvo de ĉirkaŭ 60 mil homoj en Irlando, fariĝis eĉ plene oficiala lingvo de EU. Ĝuste antaŭ la somera paŭzo, la ministroj de EU decidis akcepti ankaŭ la kimran kiel kunoficialan lingvon de EU.

La kimra estas kelta lingvo, parolata de ĉirkaŭ 540 mil homoj en la okcidenta parto de la insulo Britio. Ĝi aldoniĝas al aliaj lingvoj nomataj “kunoficialaj” kiel la menciitaj kataluna, eŭska kaj galega. “Ministroj povos paroli kimre, kiam ili estos reprezentantoj de la Unuiĝinta Reĝlando en la Konsilio, kaj la vortoj estos tradukataj samtempe”, — klarigas interna dokumento de la Eŭropa Komisiono. Civitanoj ankaŭ povos skribi kimre al funkciuloj en la Konsilio kaj ricevi respondon en la kimra.

La decido de la Konsilio signifas, ke EU agnoskas ne nur la anglan kiel oficialan lingvon de la Unuiĝinta Reĝlando, sed ankaŭ aliajn lingvojn, menciitajn en la brita “konstitucio”. Tio signifas, ke la kimra kaj skotgaela iugrade oficialiĝas, sed aliaj lingvoj, ne menciitaj de la brita leĝaro, kiel la kornvala, skota, kaj nordirlanda skota ne uzeblas kiel kunoficialaj EU-lingvoj, kvankam ili estas agnoskitaj de la Eŭropa Ĉarto de Regionaj aŭ Malplimultaj Lingvoj. La decido de la Konsilio baziĝas sur tri-direkta kunveno kun la Konsilio, Unuiĝinta Regno kaj la Kimra Registaro. Ĝi efektiviĝos post kiam grupo da kimraj interpretistoj estos juĝitaj sufiĉe kapablaj laŭ la nivelo de la lingva EU-servo “SCIC”.

Aliflanke, la registaro de Skotlando petos, laŭ diplomataj fontoj, similan kunvenon por la skotgaela, lingvo parolata de



Nia brusela kolumnisto, kimro Dafydd ab Iago, nun rajtas skribi al kelkaj eŭropaj instancoj en la kimra kaj ricevi respondon en la kimra.

ĉirkaŭ 70 mil homoj. La skotgaela lingvo-komunumo alfrontas gravajn problemojn trovi sufiĉe profesiajn interpretistojn kaj tradukistojn. Ankaŭ — eĉ pli ol en Esperanto — mankas en ĝi taŭga vortaro por komplete traduki la strangan EU-lingvon de Bruselo. Spite al ĉi tiu problemo, la skota registaro jam petis la registaron de la Unuiĝinta Reĝlando por simila kunveno kiel pri la kimra. Tio signifas ke Skotlando, kiel Kimrio, devos pagi la kostojn de tradukado kaj interpretado por la koncerna lingvo. Skotlando ankaŭ pripensas oficialigi la skotan — ĝermandevenan lingvon proksiman al la angla.

La brita registaro nun negocas kun aliaj EU-instancoj por havi similan statuson por la kimra lingvo kiel en la Konsilio. Tio signifos, ke civitanoj povos skribi al la Komisiono en la kimra kaj ricevi respondon en la kimra. La tradukojn faros kimraj oficistoj. Tamen, *kunoficiala* ne signifas *plene oficiala*. “En ĉiu certigita traduko, atento estos donita al la fakto, ke la traduko ne signifas respondecon de la EU-instancoj, kaj ke ĝi havas nenian juran valoron”, — klarigis funkciulo proksima al la respondeculo pri multlingvismo Leonard Orban.

Por malpli uzataj lingvoj

Okaze de la bone mezurita raporto de Dafydd ab Iago pri la afero de la vetoo al la kataluna en la flugoj de *Air Berlin* al la Kataluna Landaro (*LOdE-166/167*, pĝ. 15), mi ŝatus aldoni kelkajn informojn.

Estas normala agado por revigli malpli uzatajn lingvojn la instigado al ilia publika uzado, ne nur de la publika administracio, sed ankaŭ de la privataj entreprenoj. Tiu instigado estis leĝigita por la unua fojo en la Tiĉina kantono (Svislando) en la 1930aj jaroj kaj ricevis juran agnoskon en diversaj ŝtatoj, se la agado ne kontraŭas la uzadon de aliaj lingvoj. Tia estas la lingvopolitiko pri la publika uzado de la kataluna en Katalunio kaj Balearoj, kaj jen la bazo por la iniciato de la baleara registaro por peti la ekuzon de la kataluna lingvo i.a. al flugkompanioj.

Eblas, krome, substreki, ke temis en tiu okazo pri skriba peto, sed ne pri leĝa devigo, kiel ekzistas en aliaj landoj kaj ankaŭ en Katalunio.

La problemo staris, kiam la direktoro de *Air Berlin*, Joachim Hunold, publike reagis en la gazeto de la kompanio senpage liverata al siaj pasaĝeroj per esprimoj taksitaj malestimaj por la kataluna lingvo, kaj misprezentis la iniciaton laŭ la tordita vidpunkto senlace ripetata de la hispanaj naciismaj amas-komunikiloj. Per similaj vortoj reagis Peter Moser, ĝenerala direktoro de la Germana Ĉambro de Komerco en Hispanio, laŭ citaĵo de Dafydd ab Iago, kiam li parolas pri “lingvaj politikoj kiuj havas la celon limigi la uzon de la hispana”.

Tamen, la uzado de lingvo ne postulas la neuzadon de aliaj, same kiel la lernado de lingvo ne signifas la forviŝon de aliaj en la memoro de la parolanto.

Alia afero estas, kiel uzi en aviadiloj lingvon, kiu estas malmulte konata ekster siaj teritoriaj limoj, tamen tio estas mal-



sama problemo, praktika. Ĉiuokaze, eblas rimarkigi, ke tio kaŭzas ne apartajn kapdolorojn por multaj alilandaj kompanioj flugantaj, ekz-e, al Ruslando, kiuj disaŭdigas surbendigitaĵajn klarigojn.

Tiun sistemon enkondukis jam pluraj entreprenoj, kiel *American Airlines*, *Ryanair* kaj *Clickair*, kiuj uzas por la transdono de kelkaj informoj la anglan, la hispanan kaj la katalunan.

Hektor Alos i Font
(Katalunio)

UEA atentigis UN pri lingvaj rajtoj

UEA, kiu ĵus reprezentigis en la Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de UN en Ĝenevo (vd. pĝ. 5), estis invitita prezenti al la Konsilio deklaron pri sia starpunkto en afero, kiun ĝi trovas grava. UEA havas la rajton sciigi siajn starpunktojn ankaŭ al tiu grava organo de Unuiĝintaj Nacioj pro sia oficiala statuso de Neregistara Organizaĵo en specialaj konsultaj rilatoj kun la monda organizaĵo. La aktuala deklaro de UEA temas pri lingvaj homaj rajtoj kaj estis submetita al la 9a sesio de la Homrajta Konsilio en Ĝenevo (8–26 sep) en la angla, franca kaj hispana lingvoj. Ĉi-sube sekvas ĝia Esperanta versio.

La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiuj ĉi rajtoj devas esti protektataj precipe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas minoritatajn lingvojn de pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo; ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante ilian gepatran lingvon kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), iliaj ĝeneralaj lern-atingoj estas pli bonaj. Krome, ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ili estas instruataj en la gepatra lingvo nur unu aŭ du jarojn kaj ili poste devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, ili povas komence sukcesi relative bone, sed proksimume ekde la kvara lernojaro ilia progreso ekmalrapidigas kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Ankaŭ gravas, ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA apogas lernadon de du, tri aŭ kvar lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon,
2. la regionan lingvon, se ĝi estas malsama,
3. la nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj,
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniu nacio — nome Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas unu neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas antaŭenigi pacon inter popoloj igante la komunikadon pli facila kaj pli justa. Uzo de komuna lingvo evitigas situacion, en kiu homoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj. Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tion ĉi koncerne siajn proprajn kunvenojn. La diferenco estas tre evidenta, kiam oni aŭdas delegitojn, kiuj sin esprimas en la angla, la franca aŭ la hispana, kaj por kiuj tiu ĉi estas ĉu la dua ĉu la tria lingvo. Kiam ekparolas iu uzanta sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas frapa — kion tiu ĉi diras, havas multe pli da pezo kaj allogas la atenton multe pli ol parolanto uzanta fremdan lingvon.

Referenco: Deklaro pri rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo, rezolucio 47/135, je la 18a de decembro 1992. http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/d_minori.htm

GK UEA

Evoluo de la membraro de UEA

Dum la traktado de la Estrara Raporto en la UK mi menciis, ke la aktuala nombro de individuaj membroj estis malpli granda ol je la sama momento unu jaron pli frue. Mi promesis informi pli detale poste. Jen freŝaj ciferoj.

La 31an de aŭgusto estis 5540 individuaj membroj. Tio estas 266 malpli ol je sama dato pasintjare (5806). Laŭ la sperto oni povas atendi, ke almenaŭ 200 membroj ankoraŭ kotizos ĉi-jare. En tiu kazo la fina nombro estos ĉ. 5750, do klare malpli ol pasintjare (6011), kvankam iom pli ol en la malbonaj jaroj 2002 (5713) kaj 2003 (5714). Eblas tamen, ke la evoluo estos pli bona, ĉar la Bjalistoka UK iomete influos jam la ĉi-jaran membronombro, kvankam ĝia efiko ĉefe aperos en la statistiko de 2009. Al ĝi sendube aliĝos multaj kongresanoj, kiuj nun ne membras en UEA.

Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kie nun estas 457 membroj malpli ol pasintjare. En Korea Respubliko estis falo de 50. Kreskoj en la cetera mondo kompensas nur duonon de tiuj perdoj. Estas do facile vidi, ke Jokohamo havis pli fortan kongresan efikon ol Roterdamo, kies kongresanoj pli grandkvante estis regulaj membroj. En Japanio la membraro pli ol duobliĝis pasintjare, sed en Nederlando ĉi-momente estas nur 6 membroj pli ol en 2007. Pli da kongresa efiko estis en Francio (+36) kaj Germanio (+16), sed la plej granda kresko tamen okazis en Ruslando (+53).

Antaŭvidita estis la plimultiĝo de junaj membroj, kiun kaŭzis la pli granda IJK. En aŭgusto TEJO havis 443 individuajn membrojn, t.e. 79 pli ol en aŭgusto 2007. Eblas, ke la fina nombro atingos 500 ĉi-jare, se oni iom puŝos.

Kelkaj landoj ankoraŭ ne pagis por aligitaj membroj, sed jam nun la nombro (11405) estas preskaŭ sama kiel fine de 2007 (11477). Aldoniĝos ankoraŭ ĉ. 400 aligitaj membroj, tiel ke la fina sumo estos ĉ. 300 pli granda ol en 2007. Do, la nombro de aligitaj membroj kreskos verŝajne iom pli ol la nombro de individuaj membroj falos, tiel ke la totala membronombro de UEA povos iom superi tiun de 2007. Aligitaj membroj plimultiĝis dank' al Hungaria Esperanto-Asocio, kiu pagis por 1348 membroj kaj en 2007 nur por 142. Tio kovras la fakton, ke en multaj landoj la nombroj malkreskis.

Osmo Buller

23 jul 2008 forpasis

Victor Ortiz Gratal (1926–2008)

esperantisto ekde 1950, multjara prezidanto de la Aragona E-Societo *Fratego*, mecenato de libroeldonado, kunfondinto de *Fundacion Esperanto* kiun li prezidis ĝis siaj lastaj tagoj.

10 aŭg 2008 en Zweibrücken (Palatinato, Germanio) forpasis honora prezidanto de TEJO

Günther Becker (1930–2008)

instruisto de la germana, aktiva esperantisto ekde 1951, prezidanto de TEJO (1956–1964) kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo (1957–1973), ĝenerala sekretario de UEA (1964–1974), fondinto de Becker-Meisberger-Instituto.

18 aŭg 2008 forpasis

Máire Mullarney (1921–2008)

flegistino, ĵurnalistino kaj klerigistino, kunfondinto de la Verda Partio de Irlando, patrino de dek unu infanoj, esperantistino ekde 1978, aŭtoro de kelkaj libroj pri edukado kaj de la libro *Esperanto for Hope* (1989).

Ni funebras kaj kondolencas.

Nostalgia retrorigardo

La informa semajnfina programbulteno de Pola Radio tre bele akcentas reciprokan kunlaboron inter geredaktoroj kaj aŭskultantoj. Tamen mi ĉiam forte sentis, ke mi estas antaŭ ĉio ricevanta flanko.

La unuan de septembro 1959 mi enmarŝis la klasejon de vilaĝa elementa lernejo ĉe la urbo Turku en sudokcidenta Finnlando kaj havis subbrake la lernolibron *Privilegia vojo al lingvoscio*, kiun verkis konata finna esperantisto Vilho Setälä. Dekunu- kaj dekdujaraj gelernantoj kaj la instruisto mem estis tre entuziasmaj. Dum kvar lecionoj semajne la klaso ekstudis la Zamenhofan lingvon. Tiam fremdlingva instruado en finnaj elementaj lernejoj ne estis ĝenerala: ni plugis netuŝitan teron.

Ekde la komenco Pola Radio diversmaniere apartenis al nia ĉiutaga laboro. Infanoj kun rondaj, admiraj okuloj kaj per akraj oreloj provis kapti la vortojn “Parolas Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto”. Iom post iom sekvis QSL-kartoj el la ĉefurbo de Pollando, ĉar ni estis ankaŭ DX-aŭskultantoj. Poste estis vico de valoraj donacoj. Ĉiuj konstatis, ke pupoj en naciaj kostumoj estis tre ravaj kaj ŝatataj. La Esperanto-redakcio de Pola Radio malfermis la eksteran mondon al junaj lernejoj.

Kompreneble la instruisto estis tre kontenta — eĉ feliĉa. Komenciĝis longa vojo sur instrua kampo, sur kiu mi vagadas ankoraŭ hodiaŭ, sed nun kun plenkreskuloj. Multo ŝanĝiĝis dum 49 jaroj, sed entuziasmo kaj Pola Radio estas la samaj — kun ili mi daŭre antaŭeniras man-en-mane. Tre sukcese radio-elsendoj nutris lingvolernadon kaj grave kreskigis faktojn kaj sciojn pri Pollando. Kun Esperanto-redakcio mi jam iris dum kvin jardekoj. Pro tio Pollando havas fortajn radikojn en mia koro. Ne estas eble forgesi tiujn, kiuj jam forpasis.

Feliĉe la nuna generacio en Mokotów firme stiras la Esperanto-ŝipon sur granda, tutmonda oceano, kiu kelkfoje estis bedaŭrinde tre ŝtorma. Ĉion bonan por la tuta teamo en Varsovio kaj Saska Keĉa.

Jorma Ahomäki (Finnlando)

La Centra Oficejo de UEA en Pollando?

Kial ne? Pollando estus plej bona loko por UEA. Ĉi tie naskiĝis Esperanto kaj ties kreinto Ludoviko Zamenhof. Ĉi tie troviĝas la naskiĝurbo de Zamenhof, en kiu venontjare okazos UK. Do, estos la ebleco pripensi kaj pridiskuti la aferon.


Bjalistoko estas vere Esperanta urbo. Troviĝas tie TV Esperanto, de tiu ĉi urbo veturas trajno *Zamenhof*, ankaŭ aliaj Esperantaj aferoj okazas. El Pollando nun disvastiĝas multaj bonaj informoj pri aferoj, kiuj atestas, ke la nuna pola registaro, parlamento kaj diversaj aŭtoritatoj komprenas ideon de Esperanto, kaj estas favora etoso por la Esperanta agado en Pollando, kaj dank’ al s-ino Handzlik, kiu laboras en la Eŭropa Parlamento, ankaŭ eŭropaj aŭtoritatoj pripensos, ĉu Esperanto ne povus esti unu el la lingvoj de EU kaj Parlamento.

Se temas pri Bjalistoko, do jam antaŭ multaj jaroj oni deziris tie konstrui Esperantan Centron. Eble nun venis la tempo por reveni al tiu ĉi iniciato kaj, por ke la konstruaĵo servu ne nur kiel centro de Esperanto, sed ankaŭ por ke en tiu ĉi urbo troviĝu Centra Oficejo de UEA. Kaj jam nun en Pollando vivas sekretariino de UEA s-ino Barbara Pietrzak. Poste aliaj personoj povus el Roterdamo translokiĝi al Bjalistoko.

Vere valoras pripensi la aferon. Tutcerte estus kontenta pri tio Ludoviko Zamenhof kaj vivanta lia nepo Zaleski.

Karlo Lasota (Pollando)

Deteni la homojn de “la fatala misago”



Mi ricevis la julian numeron de *La Ondo*. Pro tio mi tre dankas al vi kaj al la tuta skipo de tiu valorega periodaĵo.

Tiun ĉi okazon mi ankaŭ profitas por danki al la recenzisto, kiu pritraktis la libron *Memmortigo kaj Ĝiaj Konsekvencoj*. Malgraŭ kelkaj eraretoj (Allan Kardec estis ne kuracisto, sed instruisto), s-ro Nikolaj Penĉukov trafis la celon de la libro, nome servi kiel “alternativa vidpunkto al nia mondo”

kaj deteni la homojn de “la fatala misago”.

En Brazilo la esperantista kaj la spiritisma movadoj bone reagis al la recenzo de s-ro Penĉukov. Dum la lasta Brazila Kongreso de Esperanto, kiu okazis en julio en Fortaleza, oni parolis pri ĝi dum la kunsido de esperantistaj spiritistoj. La aŭtoro de la libro, s-ro Gerson Monteiro, ankaŭ aludis al la recenzo dum sia programo, elsendata de *Radio Rio de Janeiro*.

Fabiano Henrique (Brazilo)

Esperantistoj helpu infanojn

Mi legis en la reto la libron *Oscar kaj Roza Sinjorino* de Éric-Emmanuel Schmitt. Knabo skribis leterojn al Dio. Li malsanis je leŭkemio. La knabo mortis en la fino... Mi legis larmante. Mi proponas nomi projekton: “Esperantistoj de la mondo al infanoj”.

En Ruslando estas Fonduso por helpo al malsanaj infanoj ĉe la Instituto de infana hematologio en Sankt-Peterburgo:

✉ bmt@spmu.rssi.ru, www.advita.ru

Olga Ĵilina (Ruslando)

Faktoj sen komentoj

The Vanity Fair 100

Populara magazino *Vanity Fair* publikigis en septembro sian tradician liston de la cent plej influaj personoj en la mondo. Vladimir Putin, la ĉefministro de Ruslando, unuafoje okupis la unuan lokon en “The Vanity Fair 100”, devancinte la pasintjaran “influegulon” Rupert Murdoch. Jen la unua deko:

1. Vladimir Putin (ĉefministro de Ruslando), 2. Rupert Murdoch (News Corporation), 3. Sergey Brin, Larry Page kaj Eric Schmidt (Google), 4. Steve Jobs (Apple, Disney, kaj Pixar), 5. Warren Buffett (Berkshire Hathaway), 6. Jeff Bezos (Amazon), 7. Mohammed bin Rashid al Maktoum (gvidanto de Dubai), 8. Roman Abramoviĉ (Millhouse Capital), 9. Angelina Jolie kaj Brad Pitt (aktoroj), 10. Al Gore (eksvicprezidanto de Usono, Nobelpremiito pri Paco 2007).

Kia estas Usono? Malamika...

En aŭgusto la fondaĵo “Socia opinio” faris en Ruslando tradician opinisondon pri Usono. Je la demando pri la rolo de Usono en la nuntempa mondo 71% da demanditoj respondis, ke ĝi estas negativa, kaj nur 4% — pozitiva. Tio estas “malrekordo”, ĉar en la similaj opinisondoj dum la lastaj sep jaroj pozitive taksis la rolon de Usono inter 12% kaj 25%.

Laŭ 68% da respondintoj la ruslandaj-usonaj interrilatoj malboniĝis, laŭ 17% ili ne ŝanĝiĝis, kaj nur 2% opinias ke ili pliboniĝis; la ceteraj ne havas opinion pri tio.

75% da ruslandanoj opinias Usonon malamiko de Ruslando, kaj nur 10% kredas ĝin amiko.

Ĉinaj esperantistoj por la Pekinaj Olimpikoj

De la 8a ĝis la 24a de aŭgusto 2008 okazis en Pekino la 29aj Olimpikoj. Tio kunvenigis pli ol 10 mil sportistojn kaj trejnistojn el 204 landoj kaj regionoj kaj altiris rigardojn de la homoj ŝatantaj sporton. La Olimpikoj estas granda afero ne nur por pekinanoj, sed ankaŭ por la ĉina popolo, inkluzive de ĉinaj esperantistoj.

Por bonvenigi la Pekinajn Olimpikojn kaj la Pekinajn Handikapulajn Olimpikojn la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) eldonis *Manlibron pri Olimpikaj Vortoj* en kvar lingvoj — Esperanta, ĉina, angla kaj franca surbaze de *Poŝlibreto por gespportistoj* eldonita de UEA. Krome, en tiu ĉi manlibro oni aldonis novajn vortojn kaj utilajn informojn, ekzemple, la kodojn por telefonado, la gastigantajn urbojn de ĉiuj Olimpikoj kaj la tabelon de konkursoj de la Pekinaj Olimpikoj.

Agadis por la Olimpikoj ne nur la ĈEL, sed ankaŭ individuaj esperantistoj. Multaj sin anoncis por fariĝi volontuloj. Post ekzameno Zhong Sheng, esperantisto el la provinco Jiangxi, iĝis volontulo de la Pekinaj Handikapulaj Olimpikoj en la Skerma Halo de la Nacia Konferenca Centro. Tio estas favora al konigo de Esperanto en Ĉinio.

Esperantista Volontulo Zhong Sheng



Dum la Pekinaj Olimpikoj pli ol 500 mil turistoj el aliaj landoj venis al Pekino. Antaŭ la Olimpikoj, la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) fondis “Familion de Esperantistoj en Pekino” por gastigi alilandajn esperantistojn.

La 15an de aŭgusto brazila esperantisto Roger Borges, loĝanta en Hispanio, kaj lia hispana amikino Olga Cervera venis en Ĉinion. En Pekino ili vizitis la Imperiestran Palacon, la Ĉielan Altaron, la Someran Palacon kaj la Grandan Muron. Kvankam ili ne sukcesis aĉeti



Brazila esperantisto kaj lia korea amikino en la Olimpika Parko

bileton por la Pekinaj Olimpikoj, ili rigardis sportejoj en Pekino, ekzemple la *Birdneston* kaj la *Akvokubon*. (Iliaj oficialaj nomoj respektive estas la Nacia Stadiono de Ĉinio kaj la Nacia Naĝa Centro de Ĉinio.) La 19an de aŭgusto ili vizitis la redakcion de *El Popola Ĉinio* kaj kunvenis kun pekinaj esperantistoj. En la kunsido la prezidanto de PEA, Li Weilun, instruis al ili simplajn ĉinajn vortojn, kaj veterana ĉina esperantisto Laŭlum donacis al ili verkojn tradukitajn de li mem. La 20an de aŭgusto ili veturis al la antikva urbo Xi'an en la meza Ĉinio por daŭrigi la vizitadon.

Alia brazila esperantisto, Juliano Paiva Junho, kaj lia korea amikino vizitis Pekinon de la 17a ĝis la 23a de aŭgusto. La 22an de aŭgusto Juliano kaj lia amikino vizitis la Olimpikan Parkon, kie kuŝas la *Birdnesto*, la *Akvokubo*, la Nacia Sporthalo de Ĉinio kaj la Skerma Halo. En la parko ili akiris sciojn pri la sportejoj, pri antikvaj kortoj, muzikiloj kaj sportoj de Ĉinio. Juliano diris: “Mi vizitas la Olimpikan Parkon unuafoje, ĝi estas tre bela”.

Dum la Olimpikoj pli ol 20 mil fremdlandaj ĵurnalistoj raportis en Pekino. Ili povis libere fari intervjuojn. La prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Jacques Rogge diris, ke per la Pekinaj Olimpikoj la mondo pli bone ekkonis Ĉinion, kaj samtempe ankaŭ Ĉinio pli bone ekkonis la mondon. Ŝajnas al mi, ke la Olimpikoj ankaŭ

donis ŝancon al alilandaj esperantistoj konatiĝi kun la ĉina Esperanto-movado kaj kun ĉinaj esperantistoj.

La 5an de aŭgusto raportisto Ian Johnson el *Wall Street Journal* vizitis la redakcion de *El Popola Ĉinio* kaj intervjuis veteranan esperantiston Tan Xiuzhu, eksestron de *El Popola Ĉinio* Hou Zhiping, la oficejstron de ĈEL Wang Ruixiang kaj aliajn esperantistojn.

Krome, Sarah Nassauer, redaktoro de la sama gazeto telefone intervjuis Ye Nianxian, la vicsekretarion de PEA.

Li Jianhua



Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj

de Jules Verne

Ĉapitro 33, en kiu Fileas Fogg pruvas sian kapablon en ĉiaj cirkonstancoj

Post unu horo la vaporŝipo *Henrietta* preterpasis la lumturon ĉe la buŝego de la rivero Hudsono, la kabon Sandy Hook kaj sin turnis al la oceano. Dum la tago ĝi laŭiris Long Island preter la lumturo de Fire Island kaj rapidis orienten.

Sekvatage, la 13an de decembro, je tagmezo viro suriris la ferdekon por biri. Oni certe pensos, ke tiu estis kapitano Speedy. Tute ne: estis kavaliro Fileas Fogg mem!

Kapitano Speedy estis enŝlosita en sia kajuto, kaj hurlis terure paroksisman koleron, cetero tute pardonindan.

La afero estis tre simpla. Fileas Fogg volis Liverpolon, la kapitano ne volis. Ŝajne akceptinte Bordozone, dum la tridek horoj de la vojaĝ-komenco Fileas Fogg per siaj bankbiletoj tiel agitadis la skipanaron (maristojn, mekanikistojn), ke tiu dubinde honesta skipo en malbona rilato kun sia kapitano tute obeis la vojaĝanton. Jen kial Fileas Fogg estre anstataŭis kapitanon Speedy enŝlositan en kajuto, jen kial *Henrietta* direktis sin al Liverpolo. Klare estis, laŭ lia maniero manovri, ke s-ro Fogg siatempe jam estis maristo.

Kiel finiĝos tiu aventuro, oni scios pli poste. Tamen s-ino Aŭda estis maltrankvila, kvankam ne montrante tion. Fiks estis komence ŝtonigita, kaj Trapasul' trovis la faron tute simple admirinda.

“Inter dek unu kaj dek du nodoj”, — diris kapitano Speedy, kaj fakte *Henrietta* konservis tiun mezanan rapidon.

Do se la maro restos favora, se la vento ne venos el oriento, se okazos neniu akcidento al la ŝipo, precipe al la maŝino (kiom da “se”!), *Henrietta* kuros la tri mil mejlojn de Novjorko al Liverpolo en naŭ tagoj, inter la 12a kaj la 21a de decembro. Tamen post la alveno, la afero de *Henrietta* aldone al tiu de la Banko riskus konduki la ĝentlemanon en eble tro nedezirita danĝeron.

Dum la unuaj tagoj la navigado okazis en perfektaj kondiĉoj. La maro ne estis tro forta; la vento ŝajnis stabile veni al nord-oriento; oni hisis la velojn, kaj helpe de ili *Henrietta* rivalis kun la grandaj oceanŝipoj.

Trapasul' estis feliĉega. La lasta heroaĵo de lia mastro, kies konsekvencojn li ne volis ekzameni, entuziasmigis lin. Neniam la skipanoj vidis junulon tiel gajan, tiel viglan. Li senĉese amike

rilatis kun ili kaj mirigis ilin per siaj gimnastikaĵoj. Al ili li vokis per la plej agrablaj vortoj kaj donacis la plej bongustajn trinkaĵojn. Laŭ li la maristoj manovradis kiel ĝentlemanoj kaj la hejtistoj laboris kiel herooj. Lia gaja humoro tre komunikema infektis ĉiujn. Li forgesis la estintan tempon, ties malfacilaĵojn kaj danĝerojn. Li nur pensis pri la tiel proksima celatingo kaj ofte bolis pro senpacienco, kvazaŭ la kaldronegoj de *Henrietta* varmigis lin mem. Ofte la brava knabo rondiradis ĉirkaŭ Fiks, rigardante tiun kun tre esprimivaj okuloj; sed li neniam alparolis la policiston, ĉar neniam intimeco nun restis inter la eksamikoj.

Cetero necesas diri, ke Fiks mem komprenis nenion! La konkero de *Henrietta*, la subaĉeto de ties skipo, la sperta marista manovrado de Fogg, ĉio tio kirlis lian cerbon kaj li ne kapablis plu pensi. Sed fine, kial ĝentlemano kapabla ŝteli kvindek kvin mil pundojn ne povus krome kaperi la ŝipon *Henrietta*? Kaj Fiks tute nature ekpensis, ke *Henrietta* estre de sia nova kapitano ne iros al Liverpolo, sed ke Fogg, ŝtelisto iĝinta pirato, kondukos ĝin al iu ajn mondloko trankvila kaj sekura por li. Oni konsentu, ke tiu hipotezo ja estis konsiderinda, kaj la policisto ekbedaŭris, ke li enŝoviĝis en la aferon.

Dume kapitano Speedy plu hurlis en sia kajuto, kaj Trapasul', komisiita pri lia nutrado, alportis manĝojn nur kun tre zorga singardemo malgraŭ sia supera fortikeco. Sed s-ro Fogg ŝajne ne plu eĉ imagis, ke *Henrietta* havas kapitanon.

La 13an oni laŭiris la finon de Novlando, danĝera loko, precipe vintre, kun ofta nebulo kaj timindaj ŝtormoj. De la hieraŭo la barometro subite desupris, anoncanta baldaŭnan ŝanĝon en l' atmosfero. Kaj fakte dumnokte la temperaturo ŝanĝiĝis, la malvarmo akriĝis kaj la vento ekvenis el sud-oriento.

Tio estis malfavora cirkonstanco. Por konservi sian direkton Fogg devis malhisigi la velojn kaj akceligi la vapormaŝinon. Tamen la malalta ritmo de la hulo bremsis la ŝipon per siaj ondoj batantaj la stevenon. La konsekvenca forta tangado malrapidigis ĝin. La vento iom post iom iĝis tempesto kaj estis antaŭvidebla la tempo, kiam *Henrietta* ne povos plu rekte alfronti la hulon. Se



fuĝo iĝus necesa, oni riskus ĉiajn neantaŭvideblajn misfortunojn.

La vizaĝo de Trapasul' malheliĝis kiel la ĉielo, kaj dum du tagoj la brava knabo travivis terurajn momentojn. Sed Fileas Fogg estis kuraĝa maristo, kapabla rezisti kontraŭ malfavora maro. Li persiste pluiris, konservante la tutan vaporforton. Kiam *Henrietta* ne povis superpasi la ondon, ĝi trapasis ĝin kun sia ferdeko tute markovrita. Kelkfoje la helico superakviĝis, freneze rapide batante la aeron, kiam akvomonto levis la pobon; sed la ŝipo plu iradis.

Tamen la vento ne tiel malboniĝis, kiel oni timis. Ne estis unu el tiuj uraganoj kun vento je naŭdek mejloj hore; tiu restis nur tre forta. Bedaŭrinde ĝi obstinis el sud-oriento, malebligante rehis la velojn. Kiel oni baldaŭ scios, tiu helpo al la maŝino estus tamen tre utila!

La 16a de decembro estis la sepdek-kvina tago post la foriro el Londono. Fine *Henrietta* ne ankoraŭ maltrankvilige malfruis. Ĝi jam faris pli-malpli la duonon de la transirado kaj preterpasis la plej malfacilajn lokojn. Somere oni certus pri la sukceso, sed vintre ĉio dependis de la vetero. Trapasul' silente esperis, ke se la vento malaperos, almenaŭ ĝin kompensos la vaporforto.

Sed tiun tagon la mekanikisto suprenvenis kaj vigle interparolis kun s-ro Fogg.

Ne sciante precize la kialon, sendube pro antaŭseno, Trapasul' malprecize endubiĝis. Li volonte pagus per la perdo de unu orelo la kapablon de la alia aŭdi la konversacion. Li tamen povis elkompreni tiujn lastajn frazojn:

— Ĉu vi certas pri via diro? — demandis s-ro Fogg.

— Ne, sinjoro, — respondis la mekanikisto. — Pensu, ke de nia foriro

ni maksimume varmigas ĉiujn maŝinkaldronojn. Ni havis sufiĉe da karbo por kviete iri de Novjorko al Bordojo, sed ne sufiĉe por tutrapide akceli al Liverpolo!

— Mi pripensos la aferon, — nur respondis s-ro Fogg.

Trapasul' komprenis, kaj terura maltrankvilo envolvis lin: mankos karbo!

“Ha! — li pensis, — se mia mastro venkos tiun obstaklon, li iĝos famulo!”

Renkontinte Fikson, li ne povis sin deteni de rakontado pri la afero.

— Vi do kredas, ke ni vojaĝas al Liverpolo? — respondis la policisto kun streĉitaj makzeloj.

— Kompreneble!

— Vi stultulo! — nur respondis Fiks, levante la ŝultrojn kaj turnante la dorson.

Trapasul' estis tuj fortike respondonta al la insulto, kies veran motivon li cetere ne povis kompreni; sed li tiam pensis, ke la malfeliĉa Fiks sendube estas tre ĉagrenita, tre humiligita en sia memamo post tia tute erara ĉirkaŭmonda vagado, kaj li absolvis la ofendinton.

Kaj nun kion faros Fileas Fogg? Malfacile imagebla respondo. Tamen la flegma ĝentlemano ŝajne decidiĝis, ĉar la saman vesperon li vokis la mekanikiston kaj diris:

— Varmigu kiel eble plej intense, ĝis la elĉerpo de la tuta karbo.

Tuj poste la tubo de *Henrietta* eljetis torentojn da fumo.

La ŝipo do plenvapore pluiris; sed, kiel jam anoncite, la mekanikisto venis sciigi post du tagoj, la 18an, ke hodiaŭ la karbo elĉerpiĝos.

— Ne malaltigu la varmon, tute male; plipotencigu la valvojn, — respondis s-ro Fogg.

Ĉirkaŭ tagmezo Fileas Fogg biris, kaj poste petis Trapasulon venigi kapitanon Speedy. Estis kvazaŭ ordoni al la brava knabo elkaĝigi tigron; li pensis:

“Li estos vere rabie furioza!”

Fakte post kelkaj minutoj tra krioj kaj blasfemoj alvenis kapitano Speedy kiel tuj eksplodonta bombo. Kiam la bona kapitano povis el sia tempesto de kolero diri siajn unuajn vortojn, li hurlis:

— Kie ni estas?

Feliĉe lia farto estis bona, ĉar li riskis apopleksion; kun tute ruĝa vizaĝo li ripetis:


— Kie ni estas?

— Je sepcent sepdek mejloj de Liverpolo, — respondis s-ro Fogg kun nekonzulebla flegmo.

— Pirato! — ekkriis Andrew Speedy.

— Mi vokis vin, sinjoro...

— Marrabisto!



— Mi vokis vin, sinjoro, por peti, ke vi vendu al mi vian ŝipon.

— Neniel! Je ĉiuj diabloj neniam!

— Ĉar mi baldaŭ devos bruligi ĝin.

— Bruligi mian ŝipon!

— Jes, almenaŭ ĝian supran parton, ĉar mankas hejtaĵo.

— Bruligi mian ŝipon! — ripetis kapitano Speedy, preskaŭ nekapabla pluparoli, — ŝipon kun valoro de kvindek mil dolaroj!

— Jen sesdek mil, — respondis Fileas Fogg, etendante al la kapitano faskegon da bankbiletoj.

La efiko al kapitano Speedy estis mirindega. Neniu usonano povas senemocie vidi sesdek mil dolarojn. Li tuj forgesis sian koleron, sian malliberon, sian tutan riproĉaron kontraŭ sia pasaĝero. Dudekjara estis lia ŝipo, do ties vendo estis orbrila komercafero: la bombo ne povis eksplodi, ĉar tiel s-ro Fogg eltiris ties meĉon!

— Do la fera ŝelo restos al mi, ĉu? — aldonis la kapitano per multe pli kvieta voĉo.

— La ŝelo kaj la motoro, sinjoro. Ĉu konsentite?

— Konsentite.

Andrew Speedy rapide kalkulis la biletojn kaj enpoŝigis ilin.

Dum tiu sceno Trapasul' blankiĝis, kaj Fiks ruĝiĝis preskaŭ ĝis apopleksio: pli-malpli dudek mil pundoj elspezitaj! Krome tiu Fogg forlasis al la vendinto la ŝelon kaj la motoron, kio estas preskaŭ la tuto de la ŝipa valoro! Vere estis tamen, ke la rabita banka mono estis kvindek kvin mil pundoj!

Kiam la mono estis en la kapitana poŝo, s-ro Fogg diris:

— Sinjoro, ne miru: mi perdos dudek mil pundojn se mi ne alvenos

Londonon en la 21a de decembro je la dudeka kaj kvardek kvin. Ĉar mi maltrafis la linian ŝipon el Novjorko, ĉar vi rifuzis transporti min al Liverpolo...

— Per ĉiuj inferaj diabloj mi pravis, — ekkriis kapitano Speedy, — ĉar tiel mi gajnas almenaŭ kvardek mil dolarojn! — Poste li pli kviete aldonis:

— Sciu, kapitano?..

— Fogg.

— Vi ia jankio estas.

Dirinte tion, kion li imagis komplimento, li turnis la dorson, sed Fileas Fogg aldonis:

— Tiu ŝipo nun apartenas al mi, ĉu ne?

— Certe, de la kilo ĝis la mastopintoj, sed nur pri ĉio el ligno, kompreneble!

— Bone; detruigu ĉiujn internajn aranĝojn kaj hejtu per ili.

Oni povas imagi la kvanton da seka ligno bruligita por konservi sufiĉan vaporpremon! La pobturo, la rufoj, la kajutoj, la skiploĝejoj, la kel-plafono, ĉiuj estis detruitaj.

Sekvatage, la 19an de decembro, oni dehakis kaj bruligis la dispecigitajn mastojn, bumojn, jardojn. La skipanoj nekredeble baraktis, kaj Trapasul' mem penadis kiel dek viroj. Ĉiuj ardis en tiu dishakado.

Sekvatage, la 20an, oni bruligis la pavezon, la balkonojn, la supermaran ŝelparton. *Henrietta* estis nudigita kiel pontono.

Sed ĉi-tage ili ekvidis la irlandan terbordon kaj la lumturon de Fastnet.

Tamen je la dudek-dua la ŝipo ankoraŭ estis nur proksime de Queenstown. Restis nur dudek kvar horoj al Fileas Fogg por atingi Londonon! Kaj tio estis la tempo necesa al *Henrietta* por atingi Liverpolon, eĉ plenvapore. Kaj vaporo baldaŭ mankos al la aŭdaca ĝentlemano!

— Sinjoro, — diris kapitano Speedy, kiu fine interesiĝis pri lia afero, — mi vere kompatas vin. Ĉio obstaklas kontraŭ vi! Ni apenaŭ estas je la meridiano de Queenstown.

— Ha! — diris s-ro Fogg, — ĉu Queenstown estas tiu urbo, kies lumoj vidiĝas?

— Jes.

— Ĉu eblas eniri ties havenon?

— Ne antaŭ tri horoj, nur ĉe alta fluso.

— Ni do atendu, — kviete respondis Fileas Fogg, ne montrante per sia vizaĝo, ke per lasta elturniĝo li provos ankoraŭfoje venki sian misfortunon.

Fakte Queenstown estas irlandana haveno, en kiun la oceanŝipoj el Ameriko deponas siajn lettersakojn, poste transportotajn al Dublino per rapidtrajnoj

ĉiam pretaj ekiri. De Dublino ili iras al Liverpolo per rapidaj vaporŝipoj, tiel preterpasante je pli ol dek du horoj la plej rapidajn oceanŝipojn de la marvojaĝaj kompanioj.

Fileas Fogg volis regajni ĝuste tiujn dek du horojn. Anstataŭ alveni Liverpolon per *Henrietta* morgaŭ vespere, li tien alvenos tagmeze kaj sekve povos atingi Londonon antaŭ la dudeka kaj kvardek kvin minutoj.


Je la unua post la noktomezo *Henrietta* dum alta tajdofluso eniris la havenon de Queenstown. Fileas Fogg ricevis varman manpremon de kapitano Speedy kaj lasis lin sur la restaĵo de la ŝipo, vendita kontraŭ la duoblo de ĝia prezo.

La pasaĝeroj tuj alteriĝis. Fiks tiam havis sovaĝan emon aresti la suspektaton Fogg. Li tamen tion ne faris. Kial? Kia batalo okazis en lia animo? Ĉu li ŝanĝis sian opinion pri s-ro Fogg? Ĉu li fine komprenis sian eraron? Tamen li ne rezignis. Kun li, kun s-ino Aŭda, kun spiro-manka Trapasul', li eniris je la unua kaj duono la trajnon en Queenstown, alvenis Dublino je tagiĝo kaj tuj eniris iun el tiuj vaporŝipoj, fajnaj kiel ŝtalaj ŝpiniloj, kiuj ne leviĝas sur ondoj sed trapasas ilin.

Je dudek minutoj antaŭ tagmezo la 21an de decembro Fileas Fogg fine elŝipiĝis sur la kajon de Liverpolo. Li nun estis distanca je ses horoj de Londono. Sed tiam Fiks proksimiĝis, metis al li la manon sur la ŝultron, kaj diris, montrante sian mandaton:

— Ĉu vi estas sinjoro Fogg?
— Jes, sinjoro.
— Je la nomo de la reĝino, mi arestas vin!

Tradukis el la franca
Jean-Luc Tortel



Poemoj de Konstantin Batjuŝkov

“Kion mi diru pri miaj versoj? Mi similas homon, kiu ne venis al sia celo, portante sur sia kapo belan ujon, plenan de io. La ujo dekapigiĝis, falis kaj frakasiĝis. Kiel nun ekscii, kio estis en ĝi”, — diris **Konstantín Nikolájeviĉ Bátjuŝkov** en malofta minuto de sia mensa resaniĝo...

Li naskiĝis en Vologda 18 (29) maj 1787 en nobela familio, studis en Peterburgo, kaj ekde 1802 (15-jara!) ĝis 1807 servis en la ministerio de klerigo. En 1807 li volontule armeaniĝis por partopreni la Pruslandan kampanjon kontraŭ Napoleono kaj estis grave vundita ĉe Heilsberg (nun Lidzbark Warمیński inter Kaliningrado kaj Olsztyn). Post kuracado daŭrigis militservi kaj kun la ruslanda armeo venis en Parizon.

Li komencis verki frue, jam en 1809 famigis lin la satiro *Vizio sur la bordo de Leteo* kaj poste aliaj poemoj, precipe *Miaj Penatoj*. Verkante lime de (nov)klasikismo kaj sentimentalismo, eksperimentante lingve kaj stile, li okupis tute apartan lokon en la antaŭpuŝkina rusa literaturo. Post la milito li ekverkis pli profunde, pli psikologie, pli triste. En 1817 aperis lia duvoluma kolekto *Provoj versaj kaj prozaj*, en kies dua volumo estis liaj poemoj.

En 1819 Batjuŝkov kiel diplomato forveturis al Italio, sed post du jaroj la nekuracebla hereda mensmalsano ombris lian vivon. Post kvarjara kuracado en Germanio li pasigis la vivoreston en Vologda, kie li mortis 7 (19) jul 1855. Atingis nin malmultaj liaj poemoj, verkitaj post la *Provoj*, ekzemple, *El la helena antologio* (1818) kaj *Imite al la antikvuloj* (1821), plejparton li neniigis. La ujo frakasiĝis, sed eĉ la restinta malmulto eternigis lin en la rusa literaturo. **AIKO**



MIA GENIO

*Memor' de l' koro! Venkas vi
La triston de raci-memoro,
Per via dolĉa iluzi'
Min ravas en fremdlanda foro.
La kara voĉo — en memor',
Kaj ŝia blua okulparo,
Fluantaj ondoj de l' hararo,
Senzorgaj bukloj kiel or'.
De l' paŝtistino senkompara
Vestaĵoj simplaj en imag',
Neforgesebla bildo kara
Tra l' vivo sekvas min dum vag'.
Gardanto mia, am-donito,
Dum longa diso — la konsol':
Alflugos ĝi dum dorm' al lito,
Dolĉigos sonĝon en tutsol'.*

VEKIĜO

*Zefiro sonĝon ĉe l' vekig'
De l' okulharoj ĵus forblovis,
Sed veki min por la feliĉ'
Flugiloj de Zefir' ne povis.
La dolĉo de matena pur'
Kun antaŭseno de aŭroro,
La kamp-aera bonodoro,
Kaj brilo de ĉiel-lazur',
Kaj fluga kuro de stalono
Laŭ herb-veluro sur eben',
Kaj hunda boj', ĉaskorna sono
Ĉe golf' dezerta je maten' —
Ho ve, gajigas jam nenio
Animon plenan de sopir'
Ne venkos en fier' racio
La amon per malvarma dir'.*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Tri novaj libroj de “Sezonoj”

La unuan de septembro en la Esperanto-domo en Kaŭno (strato Zamenhof 5) la gvidantoj de la eldonejo *Sezonoj* (Kaliningrado, Ruslando) kune kun la prezidanto kaj sekretario de la Litova Esperanto-Asocio tostis okaze de la apero de tri novaj libroj de *Sezonoj*. Same kiel ĉiuj lastatempaj libroj de nia eldonejo (escepte de unu, *Samideanoj*, presita en Pollando), ili estis presitaj en Litovio.

Verne, Jules. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*: Romano / Tradukis el la franca Jean-Luc Tortel; Antaŭparolo kaj notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 208 paĝoj. — (Serio *Mondliteraturo*; Volumo 15).

Laŭ statistiko de Unesko, Jules Verne (1828–1905) okupas la trian lokon en la tradukindekso post Walt Disney kaj Agatha Christie, kaj antaŭ Ŝekspiro kaj Lenino, kaj do li estas la plej tradukata neanglalingva aŭtoro kun 4162 tradukoj eldonitaj en ĉ. 150 lingvoj.

Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj jam dum 135 jaroj restas unu el liaj plej legataj romanoj. Oni eldonas kaj reeldonas ĝin, aperas filmoj (la lasta en 2004 kun Jackie Chan kaj Arnold Schwarzenegger, por kiu ĝi estis la lasta filmo antaŭ la gubernatoriĝo en Kalifornio), movbildoj, radiospektakloj, komiksoj. Bedaŭrinde, inter dekoj da ĝiaj lingvaj versioj ĝis nun mankis Esperanto.

La traduko de Jean-Luc Tortel ŝtopas ĉi tiun breĉon kaj ebligas al la

esperantista legantaro rektan aliron al la romano, en kies itinero, estas, interalie, kvar urboj gastigintaj la Universalan Kongreson de Esperanto (Londono, Parizo, Jokohamo, San-Francisko).

Prezo: 20 eŭroj



Borges, Jorge Luis. *La sekreta miraklo*: Prozo kaj poezio / Kompilis István Ertl. Tradukis el la hispana Jorge Camacho, Giulio Cappa, Tomasz Chmielik, Fernando de Diego, Liven Dek, István Ertl, Higinio García, Kris Long, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Francisco Veuthey; Antaŭparolo de Jorge Camacho; Notoj de István Ertl, Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 200 paĝoj. — (Serio *Mondliteraturo*; Volumo 16).

Transkontinenta argentinano, klavida blindulo, Jorge Luis Borges (1899–1986) kreskis en la lastaj jardekoj al tutmonda staturo de literatura jarcent-estro. Faktoj kaj fikcioj, filologio kaj fantazio kunkreis ĉe li rakontojn punte fajnajn sed fortikajn kiel naturŝtonoj, kiuj ofte impresas per ia evidento pra-mitologia.

Ĝuste ĉar la verkaro de Borges jam fariĝis aksioma ekirpunkto por generacioj da verkistoj kaj alikampaj artistoj, urĝis havi volumon de la Borgesa prozo kaj poezio ankaŭ en Esperanto. Tion prizorgis dek unu diverslandaj tradukintoj. Eĉ nia lingvo ne proponas elirejon el la Biblioteko de Babelo. Eble ankaŭ *La sekreta miraklo* enviciĝos sur la bretoj

de tiu senfina libraro, esence ne pli deĉifrebla ol ĝiaj samsortanoj. La certeĉo ke ĉio jam estas skribita nin nuligas aŭ nin igas vantaj.

Prezo: 18 eŭroj



Korĵenkov, Aleksander. *Unu Ringo ilin regas*: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto: Prelegoteksto. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 16 paĝoj. — (Serio *Sed ne el katedro*; Volumo 4).

Unu Ringo ilin regas estas eseo de Aleksander Korĵenkov pri la projekto *Tolkien en Esperanto*. Kiel prelego, ĝi estis prezentita en pluraj renkontiĝoj kaj kongresoj, laste en BET-43 (Šiauliai, 2007), Arta Lumo (Kuopio, 2007) kaj ARKONES XXIII (Poznań, 2007). Unu el fruaj versioj de la teksto aperis en *Lingva Arto*, jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton (Rotterdam: UEA, 1999).

La eseo de Korĵenkov estas interesa ne nur por la ŝatantoj de Tolkien, sed ankaŭ por tiuj, kiuj interesiĝas pri la Esperanta tradukarto kaj pri la verkaro de William Auld, kies tradukon de *La Mastro de l' Ringoj* ni reeldonis pasintjare.

Prezo: 3 eŭroj

Mendu la novajn (kaj pli frue eldonitajn) librojn de *Sezonoj* ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo. Litovianoj povas aĉeti ilin favore en la Esperanto-domo. Ruslandanoj kaj pollandanoj mendu rekte ĉe la eldonejo. Nur escept-okaze ni sendas librojn al individuaj aĉetantoj en aliaj landoj. La libroj estos aĉeteblaj ankaŭ en la XXIVa ARKONES en Poznań (Pollando).



Esperanta Antologio

La unuan provon kunmeti poezian antologion en Esperanto entreprenis Antoni Grabowski en 1893. En lia *La Liro de la Esperantistoj*, krom tradukoj, estis dudek tri originalaj poeziaĵoj de dek aŭtoroj. Post dek jaroj, kompilante la *Fundamentan Krestomation*, Zamenhof enmetis en ties poezian parton proksimume duonon de *La Liro*. Longan tempon post tio neniu simila kolekto estis entreprenita. En 1938 ĉe *Literatura Mondo* devus aperi *Nova Krestomatio*, sed la konataj eventoj malebligis tion.

Nur 65 jarojn post la kolekto de Grabowski aperis en 1958 la *Esperanta Antologio*, kompilita de William Auld. Li rakontis pri la kialo de la eldono:

«Mi ricevis de Butler amason da malnovaj etaj poemaroj, ekzemple, de Schulhoff, Emba kaj multaj aliaj. Mi konstatis, ke ili estas nekonataj. Mi ne pensis reldoni ĉion, sed mi konsciis, ke mi bezonas tutsimple antologion de la originala poezio. Kaj mi kompilis ĝin unuavice por ke mi havu ĝin. Mi diris pri tio al Juan Régulo, kaj Juan neniam diris: “ne”».

La longa laboro de la klera kaj zorgema kompilanto, kaj la entreprenemo kaj sento pri oportuneco de la eldonanto rezultigis libron entuziasme akceptitan de la kritiko kaj la publiko, kiu iĝis por *Stafeto* komerca sukceso. Jen libro impona: 648 paĝoj sub flame ruĝa kovrilo, kun antaŭbildo kaj internaj gravuraĵoj. Krom la poezia parto, ĝi enhavas principdeklaran enkondukon kaj postajn bio-bibliografiojn, glosojn kaj notojn. La kompilinto aranĝis la tuton kiel artverkon, laŭ siaj gustoj kaj idealoj.

La evoluon de Esperanta poezio Auld dividis en tri periodojn, kies limoj estas la du mondmilitoj: *Primitiva Romantismo*, *Polurita Romantismo* kaj *Metafiziko*. Tiu periodigo (pruntita el la brita literaturhistorio) kaj la nomoj de la periodoj (precipe *Metafiziko*) estis diskutindaj.

Naŭdek poetoj el 30 landoj estas reprezentitaj per 385 poemoj. El la unua periodo — 23 poetoj, el la dua — 43, kaj el la tria — 24. Laŭlingve la pli multaj poetoj dum la unuaj 70 jaroj de Esperanto estis slavlingvaj (32), sekvas ĝermanlingvaj (27), latinidaj (18), finn-ugraj (9). Aperas azianoj, mankantaj en la antaŭaj kompilaĵoj. Finfine, estas bazo por la Esperanta literaturhistorio.

Inter la aplaŭdoj (“Libro belega, libro bonega, libro necesa”, — Clelia



Reklamo de EA en *Norda Prismo* (1960, №3)

Conterno Guglielminetti), oni konstatas, ke “eĉ la subjektiva elekto povus ŝanĝi — ne certe juste — nur kelkajn el la specimenojn” (Ferenc Szilágyi). Ankaŭ por EA validas la vortoj, kiujn Kalocsay skribis por la antaŭparolo de la neaperinta *Nova Krestomatio*: “Ne ĉiuj poemoj havas, kompreneble, egalan valoron en la libro. Nia literaturo estas juna, lingvo kvindekjara estas ankoraŭ infano. Sed eĉ se nia literaturo ne estas komparebla al la literaturo de la naciaj lingvoj, precipe al tiu de la grandaj, ĝi estas jam tamen trezoro, pri kiu ni ne devas honti, kaj en kiu jam troviĝas pecoj valoraj eĉ laŭ la plej severa konsidero”.

Auld emfazis, ke “kvankam kelkaj nuntempe opinias, ke la EA devus enhavi pli multajn poemojn de malpli multaj aŭtoroj, oni devas konsideri, ke tiutempe temis pri la unua antologio, kaj tute mankis simila materialo. Kaj mi sentis la gravecon de la historio de nia poezio, sekve mi volis montri laŭeble plej klare la vojon de la poezio en la ordo kronologia”.

Jene karakterizis la antologion Gaston Waringhien: “Grava, eĉ gravega: ĉar ne temas simple pri oportuna kolekto da poemoj. Tia ja ĝi estas; kaj mi estas certa, ke ĉiuj, kiuj amas la versojn ĝin akuros kaj foliumados per diligenta fingro. Sed multaj, inter la esperantistoj, ne konas aŭ eĉ malfidas la poezion; al ili mi min turnas nun, por insisti pri la efektiva kaj profunda valoro de tiu ĉi verko. Ĝi estas la sola, kiu povas doni al ĉiu ian precizan ideon kaj ĝustan informon pri la malvolviĝo de nia poezio, tiu poezio, kiu konsistigis ĝis hodiaŭ (kiel ordinare ĉe la junaj popoloj) la ĉefan parton de nia literaturo... Komunikigado inter la leganta (aŭ parolanta) parto kaj la verkanta parto de la esperantistaro estas io absolute

necesa por garantii unuflanke la ĝustecon, aliflanke la vivantecon de la lingvo”.

26 jarojn post la unua en 1984 aperis la dua eldono (kiel №1 en la *Jubilea kolekto* de UEA), ankaŭ sub la redakto de Auld — 888 paĝoj kun 706 poemoj el 163 aŭtoroj el 35 landoj. Sed la ampleksiĝo ne estas nura aldono de 57 poetoj verkitaj en tiuj 26 jaroj.

En la unua periodo estis aldonitaj pli ol dek poetoj, eĉ tiuj pri kiuj Auld en la unua eldono avertis, ke li vane serĉis almenaŭ unu poemon sufiĉe freŝaspektan (kiel Marie Hankel, la unua reĝino de Floraj Ludoj). Tio pliigas la historiografian valoron de EA. Por la intermilita periodo estis aldonitaj nur tri poetoj, sed la poem-elekto estis reviziita. Ekzemple, el la 15 poemoj de Julio Baghy, aperintaj en la unua eldono, nur sep estis konservitaj en la dua eldono, kaj 14 estis nove aldonitaj.

Ankaŭ la akcesoraj partoj ŝanĝiĝis. La longan enkondukon anstataŭis pli modesta postparolo, ĉar intertempe aperis la teoriaj verkoj de Auld *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* kaj *Facetoj de Esperanto*. La glosoj kaj notoj estas forigitaj; bio-bibliografioj kompletigitaj, kaj la enhavtabelo ordigita alfabeto laŭ la aŭtonomoj.

Ŝanĝiĝis la disdivido perioda:

1887–1921 *Primitiva romantismo*

1921–1931 *Matura romantismo*


1931–1956 *Parnasismo*

1956–1982 *Postparnasismo*

Pasis plia kvaronjarcento. Nia poezio evoluis; fekunde verkas nova generacio de poetoj. Estas tempo por nova eldono de EA por konservi kaj firmigi la poezian tradicion de Esperanto.

Halina Gorecka

Konatiĝu: Alejandro Cossavella



En la pasinta *Ondo* vi legis, ke Alejandro Cossavella ĉi-aŭtune turneos en Eŭropo kun sia nova disko *Hej!* Ĉar li unue koncertos en ARKONES, en kiu la abonantoj ricevos ĉi tiun *Ondon*, ni petis lin respondi kelkajn demandojn. Unue, pri li mem:

AC: Mi naskiĝis en Buenos Aires iam en la pasinta jarcento, el patro kaj patrino homaj. Kelkaj supozas ke mi devenas el eksterteranoj, sed tio ne veras. Profesie ajnisto, mi muzikas kaj elturniĝas por atingi la finon de la monato kiel eble plej bone. Mi loĝas momente en Bariloche, sudo de Argentino, montara urbo populara inter ski- kaj naturamantoj. Ĝenerale, mi loĝas kie la vento min kunportas.

LOdE: *Kial vi ekhavis ideon lerni Esperanton, kaj kiel vi realigis ĉi tiun ideon?*

AC: Iom hazarde. Mi trovis anoncon en revuo, sen kontaktadreso, kaj mi ŝatis



tion. Lernu Esperanton kaj vi havos amikojn en cent landoj... Kie mi lernu? Poste mi trovis la homon, kaj eniris la lernolibrojn plej sovaĝe. Tuj poste mi komencis muziki uzante la lingvon kaj jen mi estas, kelkajn jarojn poste, kun amikoj en pluraj landoj kaj kelkaj diskoj surbendigitaj (www.alejandrocossavella.ipernity.com)

LOdE: *Kial kanti en Esperanto?..*

AC: Ĉar mi ŝatas la lingvon kaj ties idealojn internideajn. Jam la mondo havas pli ol sufiĉaj bonajn muzikistojn en la hispana lingvo... Mia rolo en la muziko estas ĉefe en Esperanto, se mi havas rolon entute.

LOdE: *Kion vi jam faris en la Esperanto-muziko?*

AC: Unue mi partoprenigis argentincan kanton en la UK en Montpeliero en 1998. Poste mi registris la punkecan

diskon de *La Porkoj*. Poste, tiun de *Stricka Tango*. Poste, mi iris al Brazilo kaj faris, kune kun Flavio Fonseca, *Tom Jobim en Esperanto*. Poste, mi surbendigis ion pli elektronikan.

Ĉi-jare mi surbendigis kun pianisto kaj bando latineca. Mi havas plurajn kanzonojn ankoraŭ ne surbendigitajn kaj kelkajn projektojn rilate al tradukoj kaj originalaj verkoj.

LOdE: *Kion celas via nuna turneo?*

AC: La celojn trafe esprimis Flo, mi tion kopiis en mia blogo. Ĉefe vivigado de la Esperanto-kulturo en la praktiko. Ni povas paroli pri homa frateco kaj teorie diskuti pri la detaloj de la nova sento. Sed mi deziras tion sperti en la ĉiutaga mondo. Kiel mi diras en unu el miaj kanzonoj: “se iu malsatas, kiel povas manĝi mi? ĉu ni estas gefratoj, aŭ estas nura fantazi”?”

Framasona anekdoto

Solo. *The Beatles Muzik in Esperanto. Vol-0.* — [Malaga]: [Solo], 2007.

Ĉu iu memorfiksas la tagon, kiam Eduardo Vargas ekfrezeziĝis (malaganoj, antaŭ blasfemi, kontrolo, kiom akurate ridetoj dupunktkrampas post ĉiu ŝerco)?!

Mi sentas min diskvalifikinda, fiaskinte identigi la frukton de posttagmanĝa hobbio de anonima idioto (hazarde elŝutitan per reta interŝanĝilo eMule) kun vica koncepta solotronikido. Kiu do povus imagi, ke la plej intelekta komponisto de Esperantujo dum kelkaj jaroj apenaŭ rekoneble kovradis* *The Beatles*, stampitan kiel idealo de vulgareco, en kutima sengitarara arabeska barokambienco kun prokrastaj sonefektoj, ornamita per primitiva pikselarto kun skemecaj siluetoj de l' flava submarŝipo kaj la liverpola kvaropo en Abbey Road, okulvitroj de la Majstro kaj la jaro 1886 (kiu signifas, ke Esperanto pli aĝas ol la dato de la publikiĝo)?!

En nova samnumera pliprofesia versio (pri kiu temas ĉi-recenze) — kvankam je kvin titoloj pli ampleksa, sed perdinta kelkajn brilantojn, inter kiuj la Esperantohimno *La Espero* flamenkostile — Solo mastrinte larĝigis stereobazon kaj aldonis al sekvencitaj sintezaĵoj suplementajn partiojn, komplete atmosferiginte la sonon, krom *Hieraŭ* (Yesterday) kaj *Devas esti tiel aŭ lasu tion tiel* (Let It Be), pseŭdomonoaj kaj mezfrekvencaj, kun nostalgiaj vinilkrajoj de infaneco (en Sovetunio registraĵoj de *The Beatles* cirkulis plejparte en formo de radiografa samizdato aŭ rulbende, do ŝajne en la relative malriĉan Hispanion rokenrolo penetris similvoje).

Interesas, ke la lirikoj plejparte originalas, sed ĉifritas per strangaj rebusoj (amo al absurda poezio ekaperis ankoraŭ en *PoLimoRFiA ArKiteKniA*; la ortografio eĉ pli aĝas), ekzemple:

Yellow Submarine, en la maten' rundas la sun' blua maro jen en Liverpool, maxino bruas kun energi iro submar' flava sxipo jen...

La albumo dediĉitas al Aleister Crowley, hermesana ordeno *La Ora Aŭroro*, kun aludoj al Boleskine kaj *Sgt. Pippro*, do endas ĝin percepti ne kiel postmodernisman fimokon, sed daŭre kiel la mistikvojon de mistera hispana esoterulo.

Bedaŭrinde, la priskribo ne tiom perfektas, kiom ĉi psikedelsatanaĵo inteligenta — la plej interesa Esperanto-muziko de post La Bleka Forfikulo Kun Siaj Orelboristoj!

Glebo Malcev

* **Kovri.** Slangaĵo por “to cover”, t.e. fari novajn versiojn de malnovaj popularaj kantoj.



Literatura konkurso Liro-2008

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2008*.

Liro-2008 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: *Друзьям* de Pjotr Vjazemskij
4. Traduka prozo (el la rusa): *Бемоль* de Valerij Brjusov
5. Traduka prozo (el la angla): *Aloha Oe* de Jack London

En la branĉoj 1–2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitaĵojn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La tekstoj de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2008. La organizanto ĝis 1 jan 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka, sekretario

Belartaj Konkursoj de UEA en 2008

Poezio

Unua premio: Mikaelo Giŝpling (Israelo) pro *Rekviemo*;

Dua premio: Gerrit Berveling (Nederlando) pro *Mortis la Dioj*;

Tria premio: Jean-Marie Ries (Luksemburgio) pro *Tiu vino kaj Lastaj pensoj de mortanta poeto*.

Prozo

Unua premio: Lena Karpunina (Ruslando) pro *Ordinara vizaĝo*;

Dua premio: Sten Johansson (Svedio) pro *Kemio*;

Tria premio: Lena Karpunina (Ruslando) pro *Novaj tempoj*.

Eseo

Unua premio: ne aljuĝita;

Dua premio: Luiza Carol (Israelo) pro *Esperantismo kaj vegetarismo: similaj trajtoj*;

Tria premio: ne aljuĝita;

Honora mencio: Pieter Doumen (Belgio) pro *Lingvo: trezoro de la popolo*.

Teatraĵoj

Unua premio: ne aljuĝita;

Dua premio: Geraldo Mattos (Brazilo) pro *Amo ne murdas*;

Tria premio: ne aljuĝita.

Filmo

Partoprenis neniu valida konkursaĵo.

Infanlibro de la Jaro 2007

Premio: Paulo Sérgio Viana. *Breno kaj Bruno*.

GK UEA

Ricevitaj gazetoj

Esperanto aktuell, 2008/4; Esperanto sub la Suda Kruco, 2008/94; Esperanto-USA, 2008/4; FREŜO, 2008/43; Ĝenerala Informilo, 2008/151; Kontakto, 2008/2; La Movado, 2008/690; La Ondo de Esperanto, 2008/8-9; La Revuo Orienta, 2008/7; REGo, 2008/4; Scienco kaj Kulturo, 2008/3; TEJO Tutmonde, 2008/3.

Vera juvelo el Ĉinio

Poemoj pri luno: El ĉina poezio / Trad. el la ĉina. — Guozhu, 2008.

Poemoj pri luno estas eLibro el Ĉinio aperinta okaze de la Mezaŭtuna festo tie. Mi ne scias, ĉu konvenas diri *miniatura* pri eLibro, sed estas tiel. Nur 11 paĝoj, sur ĉiu el ili aperas poemeto en la ĉina lingvo kun ties Esperanto-traduko (du poemoj havas po du tradukversiojn, sufiĉe malsimilajn inter si). Mirinde, la tradukintoj estas ne nur ĉinaj.

La ĉinaj poemoj estis verkitaj en la 7a-10a jarcentoj, sed ili restas ekster la tempofluo, oni perceptas ilin nun same kiel antaŭ jarmilo... Ĉiun poemon apudas konvena ilustraĵo, supozeble, same antikva. La bildoj vere ravas.

La ĉina lingvo kaj Esperanto havas tute malsamajn tradiciojn en poezio, eĉ fonetikon diversan. Do traduki tiujn poemojn estis ege malfacila tasko, plejparte solvita sukcese. Nur ie-tie lamas ritmo — sed ni indulgu. Fakte ni rusoj estas la plej postulemaj al poemritmo, eble eĉ iom tro. Iom ĝenas rimoj inter “L” kaj “R”, sed ankaŭ tion eblas indulgi, se konsideri ke por ĉinoj tiuj sonoj malfacile distingeblas. Unu-du eraretojn rimarkos nur tia pedanto kiel mi.

La libro estas vera juvelo, valora donaco por ĉiu deziranto gustumi iom el la antikva ĉina kulturo, ekzemple, la *Lunan nokton* de Du Fu en la traduko de Saint Jules Zeev (t.e. Xu Sgengyue):

*En Fuzhou la hodiaŭnoktan lunon
rigardas la edzino unusola,
ĉar la infanoj etaj ne scipovas
ankoraŭ pensi pri l' patro fora.*

*Ŝia harar' humidus de nebulo,
Kaj en purbrilo fridus la brakĉarmo.
Ho, kiam ĉe fenestro, prilumite,
Duopos ni kun sekigita larmo?*

Valentin Melnikov

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto


www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la julia tasko *Sudoku* venis 13 respondoj, el kiuj 11 ĝustaj. Ilin sendis Aleksandro Serafim (Brazilo), Anne George, Malcolm Jones (Britio), Erkki Kemppainen (Finnlando), Lilli Giloteaux, Jackie Huberdeau (Francio), Mirosława Kubicka, Zbigniew Tylkowski, Hanna Skalska (Polando), Nikolao Nečajev, Svetlana Ševjakova (Ruslando). Librepremion ricevas **Anne George**. Ni gratulas!

2	9	1	7	8	4	6	3	5
5	7	8	3	6	9	4	2	1
3	4	6	1	2	5	8	7	9
6	5	2	9	7	1	3	8	4
8	1	7	4	3	2	5	9	6
9	3	4	8	5	6	2	1	7
7	6	3	5	1	8	9	4	2
4	8	5	2	9	7	1	6	3
1	2	9	6	4	3	7	5	8

Anguletoj



Desupre dekstren: 1. Lando en Suda Ameriko ĉe bordoj de Pacifiko; 2. Aparta libro (r); 3. Ĉiu el la ekstremaj moveblaj partoj de mano aŭ piedo (r); 4. Granda komisio; 5. = Estrado; 6. Loko, kie suferas kondamnitaj animoj de la pekuloj (r); 7. Alojo el kupro kaj zinko; 9. Manĝaĵo el kuiritaj ovoj; 11. Organa tubo, tra kiu fluas sango; 12. Orko (r); 13. =Rilatumo; 14. Granda ŝarĝbesto de dezerto (r); 15. Ĉio, kio ĉirkaŭas nin; 16. Geometria figuro kun almenaŭ du paralelaj ebenoj (r).

Desupre maldekstren: 1. Mono, cirkulanta en unu lando; 3. Kaj papera, kaj sur arbo; 4. =Termo (r); 5. Ordinara birdeto kun griza plumaro (r); 6. Kemia elemento In; 7. Rabfiŝo kun plata kapo kaj dornoj; 8. Skeleto (r); 10. Linio de vojo de planedo aŭ kometo; 11. Aldono al regno de fremda teritorio (r); 12. Malĉasta kunumado; 13. Parto de supera homa strukturo, kiu servas por pensi; 14. Tolo el kotonfibroj (r); 15. Estonto de faraono; 16. Peco de mekanismo, kiun oni movas per piedo (r).

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 10 nov 2008.

Kompilis **Viktor Alikin**

Judaj historietoj

Alia kalkulmaniero

Judo veturas vagonare de Pinsk al Varsovio. Venas la konduktoro.

Judo: "Pardonu min sinjoro. Kio estas la distanco de Pinsk ĝis Varsovio?"

Konduktoro: "Ĉirkaŭ 300 verstoj".

Judo: "Kaj de Varsovio ĝis Pinsk?"

Konduktoro (laŭte ridante): "Kio estas la diferenco? Temas pri la sama distanco: ĉirkaŭ 300 verstoj".

Judo: "Hm, tre interese".

Konduktoro (kun miro): "Kial interese?"

Judo: "Tio faras impreson, ke vi, gojoj, havas alian kalkulmanieron ol ni. Ĉe ni de Purim ĝis Pasko estas tempodistanco de unu monato, sed de Pasko ĝis Purim estas tempodistanco de dek unu monatoj".

El la kolekto de **Josef Shemer**

La dekstra bildo estas unu el tiuj, kiujn Lilli Giloteaux faris en Roterdamo dum la 93a UK.

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de *reduktoro*

Kun varma fervoro

UEA bonbolu disvastigi Esperanton. (Jakvo Schram // *La Ondo de Esperanto*, 2008, №6, pĝ. 12)

Ĉu korelacio?

aŭ: *Turismon Malten, movadon alten*

Dum la lastaj monatoj la nombro de turistoj vizitantaj Malton multe kreskis, same la nombro de eksterlandaj esperantistoj. (*Esperanto*, 2008, №5, pĝ. 118)

La alarmo de Utnoa,

aŭ: *Bonan matenon, Majstro!*

Kiel ĉefajn prelegantojn ni povas citi gravajn esperantistojn ... kiel ... Abel Montagut (fama vekisto)...

(José Roldán León. 67-a Hispana Kongreso de Esperanto // *Eŭropa Bulteno*, 2008, №7-8, pĝ. 3)

La modestiga listo, aŭ: Demetu la ĉapelon

... la superdignoj malaperas en la listo... (Renato Corsetti, 7 aŭg 2008, <http://groups.yahoo.com/group/pivgrupo/messa-ge/909>)

Superego' sendos

Ĵus pretiĝis la reeldono de 10 unuaj numeroj de *Etnismo*... mendeblaj ĉe la malnova redaktoro de la redaktoro. (*Trarigardo de la Esperanto Gazetaro*. 5 feb 2008 <http://www.polskieradio.pl/eo/dokument.aspx?iid=75215>)

Ekscitan enhavon!

Enhavas la libron multe da humuro, multe da ironio. (*La Brita Esperantisto*, 2007, №963)

Aspra vojo en Kartvelujo

Aldone, rusaj trupoj restis sur la grua teritorio mem... (Pri la eventoj en Georgio // HeKo 366 6-A, 30 aŭg 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=650>)

Salutu la sinjorinon!

aŭ: *Tondra silento en la UK*

La Esperanta Civito sendis neniun saluton al la jubilea Universala Kongreso. La mankon de tiu saluto klarigis la Konsulo... (Kial ni ne sendis saluton al UK // HeKo 367 1-C, 4 sep 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=654>)

Plukis **István Ertl**

Rotterdam, Oude Haven
K13K-KVBUS - Domoj



LPG eksplodigos vian domon



La Perdita Generacio (LPG), konsistas el naŭ grupoj, kvar muzikistoj kaj pluraj helpantoj. La kerno de la bando estas geografie centrita en Hernusando en la norda Svedio kun Tomas Q Nilsson (voĉo, gitaro, klaro, ktp), Anna Burenius (voĉo, gitaro kaj piano), Karin Nordström (voĉo, kontrabaso, perkuto, ktp), Robin Rönnlund (voĉo, akordiono, fluto, ktp) kaj Karin Malin Ekström (voĉo, melodiko, rano, ktp).

Per belaj melodioj, ludemaj tekstoj pri gravaj temoj kaj tenera etoso LPG disvastiĝis tra la mondo... Foje rapide kaj ironie, foje ĝentile kaj pensige, LPG per sia nova disko *Eksplodigos vian domon* evoluigas sian sonadon ĉe la limo inter mondmuziko, popo kaj kanzonoj. La muziko ŝajnas kapteme simpla, sed post pli profunda esploro oni rimarkas ĝian multetaĝecon. Ĉu iam ekzistis ŝlagreca kanto kun pli da akordoj ol amokanto?

Pluraj el la 13 kantoj de ĉi disko evidente iĝos famaj en Esperantio, kaj eĉ transe. Do, kuraĝu sidiĝi apud la fajro kamena kaj kuŝiĝi sub fortepiano en Kiev' kun *La Perdita Generacio*. Certe vi ne restos netuŝita, kiam ili eksplodigos vian domon.

Aŭskultu fragmenton kaj mendu: www.vinilkosmo.com

Flo

Ago-Semajno debutos en Slovakio



Venas okazo denove renkontiĝi ĉe Ago-Semajno. Ĉi-foje de 27 dec 2008 ĝis 4 jan 2009 dum pli ol semajno eblos junul-stile ripozi sendorme, amikumi, eĉ skii aŭ sledi kaj neĝbatali, se la vetero permesos.

Post pluraj ASoj en Pollando, la unuan fojon ni invitas vin al la montara parto de Slovakio, nome al Liptovský Mikuláš, urbeto turisme fama, interesa kaj bela. Laŭ la ideo pli internaciigi la novjaran renkontiĝon kaj vekigi interesiĝon pri Esperanto ne nur en Pollando, AS komencas mirindan vojaĝon en landoj de la Meza Eŭropo.

Pliajn informojn petu ĉe Ireneusz Bobrzak
✉ Torunska 82 m. 133 PL-03-226 Warszawa
✉ viavento@poczta.onet.pl
www.as.pej.pl

Peter Baláž

Adresŝanĝo de Kvinpetalo

Post pli ol dudek jaroj da konstanta strebado por bona funkciado de nia centro, Suzanne nun ŝatus ripozi kaj ĝui ĝuste merititan kvieton. Ŝi tamen daŭre korektos la taskojn de siaj perkorespondaj lernantoj. Tial ekde nun, por anonci vian alvenon, peti informojn, konfirmi aliĝon ktp ... bonvolu uzi la jenajn kontakteblecojn de *Kvinpetalo*:

✉ Esperanto-centro Kvinpetalo, 15 rue du lavoird, 86410 Bouresse ☎ 05 16 95 13 30 ✉ informoj@kvinpetalo.org



Germanio. La kulmina punkto de ĉi-jara SEFT (vd. pĝ. 9) estis, kiam Nils Audoersch vizitis ĝin per sia motora glisaviadilo. Li faris tri rondojn super la tendejoj, fotis kaj tiel salutis la atendantajn SEFT-anojn. (*Sendis Werner Pfenning*)



Barato. En la pasinta *Ondo* vi legis pri la sukcesa dek-taga Esperanto-kurso por pli ol cent gelernantoj en St. Joseph Convent School. Jam post la redaktofini ni ricevis foton, kiun ni nun volonte aperigas (*Sendis Venkatesh Reddy*)



Katalunio. La esperantistoj ŝatas raporti pri tio, ke en la mondo ekzistas pli ol mil zeoj — Zamenhof-Esperanto-Objektoj. Sed kiel oni povas nomi la trinkejon *Volapük* en Barcelono? Nia kataluna amiko proponas por tiaj planlingvistikaj mirindaĵoj uzi la vorton "malzeo". Kial ne?.. (*Fotis Ferriol Macip i Bonet*)




JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo


Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
Serio Mondliteraturo, Volumo 16
200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
Serio Mondliteraturo, Volumo 15
208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*
Serio Mondliteraturo, Volumo 9
224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon. *La flava hundo*.
Serio Mondliteraturo, Volumo 14
120 paĝoj, 12 eŭroj.